


EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

V-19034/4



Feb. 1953

Tri Taskoj por 1953

Por 1953 la ĉina popolo difinas por si mem tri grandajn taskojn.

La unua tasko estas daŭrigo kaj intensigo de la batalo kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion por gajni pli grandajn venkojn super la agresantoj. Samtempe ni daŭre klopodos por paca solvo de tiu ĉi problemo sur bazo de justo kaj racio.

La dua tasko estas komenci la unuan kvinjaran planon de nacia konstruado por ke Ĉinio transformiĝu de lando agrikultura en landon industran.

La tria tasko estas kunvoko de la Tutnacia Popola Kongreso kaj lokaj popolaj kongresoj por formuli kaj aprobi la konstitucion kaj elekti la Centran Popolan Registaron kaj la lokajn popolajn registarojn.

Tiuj tri epokfaraj taskoj estas ne disigeblaj unu de la aliaj.

Rezisto kontraŭ agreso estas la premiso por paca konstruado. La Usonaj monopolaj kapitalistoj ja revas vastigi la korean militon kaj entrepreni novan sklavigan militon por kontentigi sian nesatigeblan avidon de sanga profito. Estas evidente, ke se oni ne donus fortan rebaton al tia avido, la ĉina popolo ne povus gardi sian nacian sendependecon en sekuro kaj ne povus entrepreni ian nacian konstruadon por plialtigi la vivnivelon de la popolo, kaj la popoldemokratio ĝuata de la popolo post la liberiĝo estus minacata.

Tamen neniel pro tio la ĉina popolo fordonas la esperon atingi justan kaj decan solvon per paca rimedo, kiun ili insistis kaj insistas ekde la komenco de la armistica intertraktado, kvankam en pli ol du jaroj ni gajnis grandajn venkojn super la malamikoj. La malamikoj

perdis en la bataloj pli ol 736,000 homojn (inkluzive 322,000 Usonajn soldatojn, kaj la pereigitaj kaj damaĝitaj aeroplanoj de la malamikoj atingis 7,800.

Por la ĉina popolo la kvinjara plano estas la unua paŝo por industriiĝo kiun la ĉina popolo revis jam de jarcento, ĉar nur tio povas garantii, ke ili estos neniam plu subpremataj de la imperiistoj kaj neniam plu suferos la mizeran vivon. Tia konstruado estas ne nur ebla dum la ĉina popolo ankoraŭ devas rebati la atakojn de la imperiistoj, sed ĝi ankaŭ povas progresi kun multe pli alta rapideco ol tio en kapitalistaj landoj. Pri tio la ĉina popolo havas plenan memfidon, ĉar la faktoj en lastaj tri jaroj tion tre bone pruvis. La tuta produktkvanto de industrio kaj agrikulturo en 1952 jam superis la plej altan nivelon antaŭ la Rezistmilito kontraŭ Japanio je ĉirkaŭ 65%. La laboristoj tre bone konscias, ke la progreso de la konstruado plene koincidas kun la altiĝo de ilia vivnivelo kaj garantio de ilia nacia sendependece kaj mondpaco. La efektiviĝo de demokrata rajto al la popolo formuli sian konstitucion kaj elekti sian registaron havas grandan signifon. Tio signifas, ke komenciĝos nova pli granda progreso de la politika vivo de la popolo, pli kompletiĝos kaj pli fortikiĝos la nova demokratio kaj plie per tio la entuziasmo de la popolo en la nacia konstruado kaj defendo de ilia gajno post la liberiĝo, povos esti multe pli altigita. Tial la kunvoko de la Tutnacia Popola Kongreso kaj la lokaj popolaj kongresoj unuflanke signos plenan efektivigon de popoldemokratio kaj aliflanke kontentigos la bezonon de grandskala nacia konstruado.

Internacie, efektiviĝo de tiuj grandaj taskoj certe multe kontribuos al la paco, demokratio kaj feliĉo inter la popoloj tra la tuta mondo.

Vonsan—la Heroa Havenurbo

Vonsan—la heroa haveno, kiu staras sur la mardefenda fronto, estas urbo fierinda. Ĝia batalo, ĝia ekzisto kaj ĝia hodiaŭa aspekto elstare respegulas la bravan kaj persistan trajtojn kaj la senkompromisan batalspiriton de la korea popolo. En tiu ĉi ruinigita urbo miloj da homoj tage kaj nokte vivas kaj laboras aplombe en la forta eksploda bruo de obusoj kaj bomboj. Per sia formo de brava batalo la urbo rememorigas nin pri la neforgeseblaj heroaĵoj faritaj de la granda Sovetia popolo en Leningrad kaj Sevastopol dum la dua mondmilito.

Vespere mi veturis al vilaĝo en la ĉirkaŭurbo de Vonsan.

La noktaj aeroplanoj de la malamikoj tra la tuta nokto jetadas bombojn sur tiun ĉi regionon; ili prenas kiel atakan celon la domojn dronantajn en silenta mallumo kaj la maljunulojn, virinojn kaj infanojn loĝantajn en la domoj. Sed tio neniel povas timigi la firmaniman kaj aplomban korean popolon.

Kiam mi eniras en kamparanan domon, fajrolumo de bomba eksplodo flagradas jen proksime jen malproksime, kaj la tondrado ĉirkaŭondas tra la kamparo. La tero tremetas pro la violenta eksplodo, kaj la papero sur la pordo kaj fenestroj skuite susuras. Kiam ni ĵus enlitiĝis, falis bombo ankaŭ apud la vilaĝo kaj la ekskuo estingis la olean lampon en la ĉambrangulo. La posedanto de la domo, mezaĝa dommastrino, diras humore: "La malamika aeroplano blovestingis por ni la lampon!" La infanoj kaj mi ĉiuj ekridas.

Frumatene en la sekvinta tago mi piediris al la urbo.

Elirinte el la vilaĝo mi apenaŭ suriras la ŝoseon kondukantan al la oriento, kiam denove aŭdiĝas la sono de aeroplana motoro, kiu furiozis hieraŭ la tutan nokton. Du nigraj mararmejaj batalaeroplanoj rondŝvebas en la ĉielo kaj maŝinpafadas. Kiam ili mal-suprensturmas, forte ekpafas la kontraŭaeroplana maŝinpafilo kiu kaŝas sin sur la pinto de malproksima monteto. Kiam tiuj ĉi du malamikaj aeroplanoj apenaŭ malaperas en la blua firmamento super la maro, venas du aliaj, kaj en la ĉielo denove ekbruas la motoro de malamikaj aeroplanoj. Tamen sur la flava ŝoseo ambaŭflanke maldense borderita per arboj, oni daŭre iradas: virinoj kun pakajo sur la kapo, junuloj kun grenaj pajlosako sur la dorso, maljunuloj kondukantaj bovoĉarojn kaj oficiroj kaj armeanoj de la Popola Armeo, ĉiuj iom disiĝas kaj daŭre iradas tra tiu ĉi ŝoseo aplombe. Kiam la malamikaj aeroplanoj alflugas super ilin, ili kaŝas aŭ sidas en la ombroj de la arboj flanke de la ŝoseo, ripozante kaj observante la malamikajn aeroplanojn rondflugantajn en la ĉielo. Kiam la malamikaj aeroplanoj foriris, ili denove ekmoviĝas sur la ŝoseo irante por siaj respektivaj laboroj.

Mi alvenas antaŭ grandan riveron super kiu kuŝas ligna ponto ankoraŭ ne fininstalita sed jam de homoj trapasebla. Sur ambaŭ riverbordoj senorde kuŝas arbotrunkoj ne senŝeligitaj apud la finoj de la ponto. Estas videble ke la konstruado de la ponto estas streĉe irigata. Sed sur ambaŭ bordoj sin trovas neniuj homoj; oni nur aŭdas la rondŝvebadon de malamikaj aero-

planoj kaj la bruan frapadon de la riverakvo al la pontkolonoj. La aeroplanoj turnis sin suden de la monto, kaj mi transiris la riveron tra tiu ĉi silenta ponto. Ne pli ol kelkajn dekojn da paŝoj mi antaŭeniris, kiam subite aŭdiĝas malantaŭ mi homa bruo. Min returninte mi ekvidas ke subite aperis sur kaj sub la ponto multe da homoj: viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj. Ili ĉiuj transportas lignon sur la ŝultroj kaj fosas teron, neniuj scias de kie ili venis. Profitante la paŭzon de kelkaj minutoj dum la atako de la malamikaj aeroplanoj ili streĉe rapidas ripari la ponton por certigi ĉi tie baldaŭan trapaseblecon por veturiloj kaj homoj.

Daŭrigante mian iradon mi aŭdas timpanskuan kanonadon el la urbo trans la monto. Ĉiun duan aŭ trian minuton alflugas eksplodaj sonoj de obusoj. Sur la vojo homoj iras sinsekve kaj trankvile en la timpanskua bruo de kanonado. Antaŭ kabano sidas maljunulino kaj knabineto antaŭ kiuj staras budo de fruktoj kaj cigaredoj. Ankaŭ staras klientatendantoj ĉe iuj enirejoj de aerdefendejoj kun anonctabuloj pendigitaj—ili estas la milittempaj vendejoj de la korea popolo.

Proksime de la urbo ruinoj despli multas. Ecepte la vojon sub miaj piedoj kaj la delikatan kaj blankan cementŝoseon en la malproksimeco, ĉie estas ruinaj amasoj kaj kavoj faritaj de obusoj kaj bomboj. Nur kelkaj fumtuboj truitaj de kugloj ankoraŭ solece staras malproksime de pli ol duonkilometro. Tio diras al ni, ke en la nordokcidenta antaŭurbo de Vonsan iam ekzistis altaj konstruaĵoj.

Turnirinte preter la montangulo mi enpaŝis la urbon. Nun aperas antaŭ miaj okuloj duoble indigniga kaj doloriga bildo: la Usonaj agresantoj radikale detruis tiun ĉi longhistorian urbon per la bomboj kaj obusoj alportitaj de trans Pacifiko. Oni jam ne plu povas trovi la pasinttempan prosperon de Vonsan. Sur la fundamenta tereno kie staris antaŭe altaj domegoj, nun plantiĝis brasiko kaj kreskas sovaĝaj herboj. Restas nur kelkaj skeletoj de ferbetonaj konstruaĵoj en radio de pluraj kilometroj.

Dum mia ĉirkaŭrigardo al tiu ĉi detruita urbo, la obusoj alpafitaj de malamikaj ŝipoj eksplodas malproksime je pli ol duonkilometro apud rompita konstruaĵo kaj ĉirkaŭ stacio kie staras vicoj da difektitaj vagonoj. Sed sur la trankvila ŝoseo irantoj paŝas kiel kutime, eĉ ne ĵetante rigardon al la eksplodo, ĉar al tio ili jam tute kutimiĝis. Mi daŭrigas iri orienten. Sur la malproksima akvosurfaco flosas nigra streko. Tie sin kaŝas nia forta marborda artilerio kiu ofte brave batalas kontraŭ la malamikaj ŝipoj.

Tagmeze ĉesis la aeroplana atako kaj kanonado de la malamikoj. En iu aer-ŝirmejo mi vidis Ĉeng Jen-piaŭ'n, Popola Ĉefkomitatano de Kangven-provinco, kiu gvidas milojn da popolanoj persisti en la batalado. Li fervore konigis al mi la vicestron Kim de la Kultura kaj Propaganda Fakoj de Kangven-provinco. Ni kune iras manĝi en manĝejo en la ĉirkaŭurbo. Trapasante ŝoseon plene kovritan de karbocindroj, mi vidas ke la stangoj de elektraĵoj fadenoj rante de la ŝoseo ankoraŭ orde staras en vicoj. La elektraĵoj sur

Kaptita en Krimea Ago

Je la 12a de januaro, la Ĉina Aera Forto paffaligis super Nordorienta Ĉinio Usonan Armean Bombanton B-29 kiu estis readaptita speciale por strategia rekognosko kaj paraŝutado de spionoj. Estis kaptitaj dek unu el ĝiaj anoj inklude de Kol. John K. Arnold Jr., komandanto de la 581 Reproviza Komunika Alo de la Usona 13a Aera Forto. Je la 23a de januaro, ankoraŭ alia entrudiĝinta aeroplano, iu F-86, estis paffaligita, kaj ĝia piloto, Lt. Kol. Heller, estis kaptita.

Je la 22a de januaro, Ministro de Fremdlandaj Aferoj Ĉou En-laj faris solenan proteston kaj averton kontraŭ tiaj perfortoj. La faktoj ne estas neigeblaj. La atesto estas tie por ĉiuj vidi. Estas miloj da atestantoj en Antung kaj Kuantien kiuj vidis tiujn aeroplanojn faligitaj. La neado de la Usonaj militinstigantoj valoras tiom kiom la neado de murdisto kaptita en la ago.

Tiuj estas nur la lastaj en tuta serio da okazaĵoj kiuj montris ke la Usonaj agresantoj estas planantaj ekspansii la militon en Koreio. Ili daŭrigis la murdadon de militkaptitoj, daŭrigis sian bakterian militon kaj la buĉadon de koreaj civiluloj per napalmo. Malobservoj al la neŭtrala zono ĉe Panmunjom, kaj precipe la maŝinpafado al la veturiloj de la Korea-Ĉina Delegacio al la armisticaj interparoloj, substrekis la malbonajn intencojn de la Pentagono. Ĉi tiuj malnoblaj agoj kaj la pliiĝantaj aeratakoj trans la bordo de Ĉinio estas minaco al paco, minaco de ekspansia milito.

La vigilanco kaj indigno de la ĉina popolo kaj la popolo de la tuta mondo estas vekitaj. Ili estas pretaj doni konvenan respondon al ia ajn nova provoko kiun povus riski ĉi tiuj militinstigantoj.

ili estis rompitaĵoj sennombrajn fojojn, sed nun ili restas perfektaj kaj fajfas pro la vento. Apud la ŝoseo ambaŭflanke estas malgrandaj pecoj da rizkampoj, kaj sur la montdeklivo apud la rizkampoj maldekstre de la ŝoseo dissemiĝis kontraŭaeroplanaj ŝirmejoj, el kiuj iuj havas blankajn tabulojn el pino kun verdaj skribaĵoj, najlitajn ĉe la enirejoj. La vicfakestro montras al mi: "Tio estas Vonsan-Librejo; tio estas ŝtata firmo...." Kiam ni preterpasas enirejon de unu ŝirmejo, el ĝi aŭdiĝas klara voĉlegado de infanoj. Li fiere diras al mi: "Tio estas la Tria Popola Lernejo. La infanoj ĉiutage lernas."

Ni alvenis negrandan manĝejon en kiu staras longa tablo kaj estas manĝantaj kelkaj laboristoj. Venas ĝeni denove malamikaj aeroplanoj, sed oni ne foriras. Kiam la malsuprensturmo de la malamikaj aeroplanoj sonas proksime, la ligna muro interne de la manĝejo subite malfermiĝas kaj oni rapide forlasas la manĝilojn kaj ĝin eniras. Tiu ĉi domo estas konstruita

ĝuste ĉe la enirejo de fortika ŝirmejo. Kiam la situacio estas urĝa, oni tuj iras en ĝin por sin ŝirmi.

La malamikaj aeroplanoj bombadas kaj maŝinpafadas, senĉese kaj freneze detruante tiun ĉi teron plene semitan per kavoj faritaj de bomboj, sur kiu restas nur ruinigitaj muroj. La vojirantoj estas devigataj sin ĵeti al la proksimaj enirejoj de ŝirmejoj. Amaso da geknaboj kun librotekoj sub la brakoj bruas ĉe la enirejo. Ili ne intencas rapide eniri en la ŝirmejon. Dum la malamikaj aeroplanoj maŝinpafadas 500 metrojn for, iu knabo kun nuda kapo ĵetas tien straban rigardon kaj poste diras al la aliaj: "Ankoraŭ malproksime!"

Post la atako de la malamikaj aeroplanoj ni returnas nin al la urbo tra la bazaro. En la bazaro estas multe da homoj kaj aĉeteblaj diversaj objektoj. La vendistoj metis la varojn en pakojn aŭ kofrojn kaj orde vicigis ilin ĉe ambaŭ flankoj de la vojo. Malantaŭ la homamasoj troviĝas vico de kavoj kun interspacoj de kelkaj paŝoj por ŝirmo kontraŭ bomboj. Ĝus la malamikaj aeroplanoj ĵetis ĉi tien du bombojn, sed ili nur detruis unu malplenan korbon de pomovendistoknabino. Inter la ruinoj en la urbo, la loĝantoj estas rikoltantaj la dike kreskantan brasikon. Tio estas ilia akiro post forigo de ruinaĵoj, fosado de tero kaj aliaj multtagaj laboroj spite la danĝeron de bombado kaj maŝinpafado. La milito jam ellernigis al la homoj ĉion; longjaraj urbanoj nun ankaŭ spertiĝis je legomplantado.

Mi enpaŝis barbarejon por min razi. Ĝi estas ŝirmejo kun du enirejoj. Duono de ĝi estas uzata kiel barbarejo kaj la alia duono kiel horloĝriparejo. La barbiro apenaŭ prenis la razilon por razi mian vizaĝon, kiam denove kanonas ĉi tien la malamikaj ŝipoj. La obusoj eksplodas ekstere ne malproksime kaj tremigas la tutan ŝirmejon. Sed la barbiro daŭre razas mian vizaĝon trankvile tenante la razilon en la mano. Tri metrojn fore, la horloĝisto sidas ĉe alia enirejo kun nigra lupeo pinĉita sur la dekstra okulo kaj atenteme horloĝon riparas.

Tiamaniere la loĝantoj de Vonsan streĉe sed aplombe vivas en la eksploda bruo de la malamikaj bomboj kaj obusoj. Dum tiuj ĉi militaj jaroj oni jam multe pli hardiĝis. Kiom ajn frenezaj estu la malamikoj, ĉiuj havas senkompare firman volon: daŭre vivi, daŭre batali, neniam cedi kaj submetiĝi al la malamikoj! Estas kredeble, se la malamikoj intencos ĉi tien enmeti siajn krimajn kaj diablajn manojn, tiuj ĉi laboristoj, barbiroj, ordinaraj urbanoj kaj la virinoj kaj maljunuloj kiuj plantis brasikon inter la ruinoj, tuj fariĝos spertaj batalantoj, ekstaros sur siajn batalpostenojn kaj kune kun la popolaj trupoj de Koreio kaj Ĉinio donos al la malamikoj batojn kiujn ili meritas.

Vesperigiĝis. La lampoj de aŭtoj eligas okulpikajn brilojn kiuj balaadas jen tien jen ĉi-tien en kaj ekster la urbo. Samtempe eksonas la mikrofonoj pendigitaj sur la stangoj de elektraj fadenoj. La malamikaj aeroplanoj denove rondŝvebas super la urbo kaj la malamikaj ŝipoj alpafas obusojn. Tamen la loĝantoj de Vonsan estas pli obstinaj ol la malamikoj. Ili despli aktiviĝas kaj denove komenciĝas antaŭ ni batala kaj vigla vespero.

La heroo Vonsan estas ja neniam pereigebla!

Trad. J. Plinov

La Harbina Aŭtomata Lin-teksejo

Ŝiaŭ Feng

En la antaŭurbo de Harbino, ebena asfalta vojo kondukas al nova modela fabriko—la unua moderna aŭtomata lin-teksejo de Ĉinio. La flu-linia beleco en ĝiaj aranĝo kaj konstruaĵoj tuj al ni montras ke ĝi ne simple “elkreskis” kiel plej multaj fabrikoj konstruitaj en la fruaj tempoj, sed estis planita por produkto, por laboro kaj por la laboristoj ĝis la plej malgrandaj detalaĵoj. Ne troviĝas superkapaj elektraj fadenoj, nek stangoj, nek malbelaj kamentuboj, nek tia malagrabra atmosfero en la korto de la malnova fabriko. Ĉiuj elektraj fadenoj kuŝas subtere. Vaporo estas liverata tra la subteraj tuboj el povostacio kiu lokiĝas kelkajn li-ojn for. La cisterno leviganta super la fabrika tereno estas gracia turo.

Interne estas plene je lumo kaj koloro, kaj la aranĝo kaj plano estas celotaŭga kaj simpla. Altrapidaj maŝinoj formanĝas la krudan linon, tra serio da kompleksaj aŭtomataj procedoj transformas ĝin en granda diverseco de gradigitaj produktaĵoj. Du virinoj sole prizorgas unu grandan kardmaŝinon. Unu el ili enmetas la krudan linon. La maŝino aŭtomate kaj skrupule kombas la fibrojn, apartigas kaj klasigas ilin kaj liveras ilin en la manojn de la dua zorganto. En la teksa fako ĉiuj varp-maŝinoj havas aŭtomatan kontrolan rimedon. Maŝino flugzumanta subite mem haltas. Aperas lumo sur ĝia montrilo, avertante ke fadeno estas rompita. Je la averto la laboristo kiu prizorgas, kunigas la du ekstremaĵojn de la rompita fadeno, kaj premas kontrolilon, la maŝino denove ekiras. Tiu ĉi aŭtomata kontrolilo ebligas la laboriston prizorgi pli multajn maŝinojn ol antaŭe, kaj samtempe malpliigas la penon en konstanta rigardo pro timo ke iu fadeno rompiĝus kaj malbonigus la laboron. La kvalito de la produkto estas ankaŭ grandege plibonigita.

En la proced-fako estas grandega blankiga maŝinkombino, longa je 70 metroj, kiu enhavas dudek kvin apartajn maŝinojn, kaj kiu estas prizorgata de unu sola laboristo, sidanta antaŭ elektra kontrola panelo, premante la regan butonon, kiam la maŝino estas preta fari tian aŭ alian procedon. Tiu ĉi maŝino povas blankigi 3,000 metrojn da kanvaso pohore. Ne malproksime de tiu ĉi vari-lerta giganto staras alia grandega tinkturada maŝinkombino, kiu enhavas kvardek apartajn maŝinojn. Ĝi povas tinkturi pohore 1,200 metrojn da blankigita kanvaso taŭga por akvo-tubo, gudrotuko, k.t.p. pasigante ĝin tra diversaj tinkturoj kaj ĥemiaĵoj por akiri la koloron deziratan.

La Plej Progresiva Tekniko; Zorgo pri Laboristoj

Malfermita last-aŭtune, je la antaŭtago de la tria datreveno de la Ĉina Popola Respubliko, tiu ĉi teksejo estas elstara ekzemplo de la amikeca kunlaborado inter Ĉinio kaj Sovetunio, de la granda kaj sindonema helpo donita de la Sovetiaj specialistoj edukitaj sub Stalin en spirito de proletara internaciismo kaj amikeco al la ĉina popolo.

La plej lastaj progresoj en Sovetiaj tekniko kaj projekto estis utiligitaj por fari la Harbinan Lin-teksejon la modelo, kio ĝi ja estas. Nenia sekreto estas retenita por la ĉina popolo por ebligi ilin konstrui tian tute aŭtomatan fabrikon en Ĉinio.

Tiu ĉi estas fabriko, pri kiu la plej postulema planisto estus fiera. La zorgo malavare donita al sia tasko de la helpantaj Sovetiaj specialistoj estas videbla je ĉiu paŝo. Du elementoj estas speciale impresaj: la alta nivelo de industriaj tekniko kaj projekto, kaj la zorgo per kiu oni adaptas tiun nivelon al la aktualaj kondiĉoj de tiu ĉi ĉina fabriko kaj al la laborsperto de la laborantaro. En la projekto por la fabriko-konstruaĵoj kaj la loĝejoj de laboristoj, ekzemple, la Sovetiaj specialistoj enkondukis adaptojn el ĉina tradicia arkitekturo. Ili ankaŭ vizitis multajn malnovajn teksejojn en la Nordoriento, pristudis la ĝeneralajn laborajn kutimojn kaj teknikajn praktikojn de ĉinaj laboristoj, iliajn viv-manierojn kaj bezonojn en manĝaĵoj, amuzadoj, loĝo kaj higieno.

Kiam oni planis la situon de la teksejo kaj la diversaj fabriko-konstruaĵoj kaj aliaj strukturaĵoj, ne nur estis konsiderata la estonta disvolviĝo de la dirita fabriko, sed ankaŭ la problemoj pri provizado de kruda materialo (lino kreskas abunde en Nordorienta Ĉinio) kaj pri merkato de la finita produktaĵo. La proponita konstruado estis parto de la plano de urbo-konstruado de Harbino.

La plej granda atento estas donita al sekureco, modernaj konvenaĵoj en fabriko praktiko kaj higieno. Taŭgaj sekurigiloj estas metitaj sur ĉiu maŝino aŭ maŝinparto, kiu kaŭzus vundon aŭ akcidenton. Kiam tiaj maŝinoj bezonas lubrikon, ili mem haltas, tuj kiam la sekurigiloj estas forigitaj.

Maŝinoj kaj laborejoj estas ŝmiritaj en koloroj, kiuj estas agrablaj al la okuloj de la laboristoj. La maŝinoj de la karda fako, ekzemple, estas ŝmir-pentritaj per la sama flavo kiel la muroj de la laborejo. La muroj en la ŝpina fako estas de la sama koloro kiel la ŝpinradoj.



Laborejoj Bone Aerumitaj

La aero de la ordinara malnova lin-teksejo kutime estis plena je polvo kaj lina senutilaĵo. Ĉi tie polvo-forigiloj kaj aerumiloj igas la aeron pura kaj freŝa. Estas trumpet-formaj tuboj kiuj ensuĉas la aeron super tiuj maŝinoj, kiuj precipe emas levi polvon. La aerumsistemo faras la temperaturon ĉiam kiel tiu de varma, freŝa, printempa mateno.

La planko en ĉiuj laborejoj, farita el materialo de speciala konsisto, estas mola tamen subpiede firma. Laŭ Sovetia teknika scio, cementa planko estas tro malmola kaj malseketa, tro nekomforta por laboradi ok horojn potage. Tiu ĉi atento al la bezono de la laboristoj iras ĝis ilia libera tempo. Proksime de ĉiu fako estas loko kie forlasinte sian laborvicon laboristo povas ŝanĝi vestojn, ripozi, bani aŭ manĝi en la manĝejo, k.t.p.

Iom malproksime de la fabriko, trans la verda zono de arboj, estas laborista vilaĝo, kie kvindek ruĝ-koloraj trietaĝaj domoj estas konstruataj kiel laboristaj loĝejoj. Dek tiaj konstruaĵoj jam estas kompletigitaj, kaj en ĉiu apartamento estas komfortaj, aerumitaj dormo-

ĉambroj, kuirejo, tualetejo kaj banĉambro. Ankaŭ estas publika manĝoĉambrego kun ekipaĵoj por sepcent personoj, unu banejo, kaj unu barbirejo. Tajlorejo, lavejo, kooperativo, bone ekipita hospitalo kaj infanzorgejo servas al la bezonoj de la familioj. Arboj kaj florgardenoj, artefaritaj montetoj, fontano, ludejo kaj vasta Palaco de Kulturo faras tiun ĉi laboristan vilaĝon alloga kaj mem-sufiĉa loĝeja areo.

La Harbina moderna lin-teksejo havas signifon ekster ĝia pura industria produkto. Kun la teknika lernejo, kiu apartenas al la teksejo kaj kie Sovetiaj specialistoj instruas novajn teknikojn tra praktika laboro al la laboristoj kaj metilernantoj post la laborohoroj, ĝi ankaŭ estas grandskala trejna centro por teksaj kadroj.

Tiu ĉi estas nur unu el la multaj tiaj grandskalaj entreprenoj en nova Ĉinio, en kiuj Sovetia helpo ludas gravan rolon en la enkondukado de la plej moderna tekniko al ĉina industrio. Tiu ĉi estas ankaŭ vojmontrilo kiu elmontras la direkton al kiu Ĉinia nova ŝtata industrio antaŭenpaŝas, kun la helpo de la progresasperto de la frata Sovetunio.

Tradukis: V. S. Ho.

Kadroj por Industriigo

Taj Jen-nien

Komenciĝos ekde 1953 senprecedenca baza konstruado, landskala kaj decida por industriigo de Ĉinio. Multaj modernaj entreprenoj stariĝos dum la baza konstruado sur la vasta kaj riĉa tero de Ĉinio. La ĉefa punkto de la baza konstruado estas peza industrio. De nun, grandskale konstruiĝos fabrikoj, minejoj kaj fervojoj, sed ankaŭ la malpeza industrio ne estos neglektataj por plibonigi la vivon de la popolo. La Centra Popola Registaro investos en la baza konstruado de peza industrio en 1953 multe pli grandan sumon ol la tuta investo en la lastaj tri jaroj. La sumo investota por la malpeza industrio ankaŭ superos la tutan investon en la lastaj tri jaroj.

Kolosa kaj komplika estas la tasko efektiviĝi la grandan tutlandan bazan konstruadon, kiu, krom kapitalo, naturaj riĉaĵoj, maŝinoj kaj materialoj, kiuj estas jam pli malpli solvitaj problemoj, bezonas ankoraŭ milojn da laborspertaj kadroj, kiuj posedas gvidkapablon, kaj ankoraŭ pli multe da teknikistoj kaj kvalifikitaj laboristoj. Do la plej urĝa problemo, kiun ni devas solvi nunmomente per la tuta povo, estas tiu de personaro. Tio havas precipe realan signifon en agrikultura lando kiel Ĉinio. Pro tio Ĉen Jun, la prezidanto de la Komitato de Financo kaj Ekonomio de la Centra Popola Registaro diris:

“La ĉefa kontraŭdiro de nuna baza konstruado estas tio ke la tasko de konstruado estas kolosa dum la forto por tio estas tre malgranda. Sekve oni devas rapide pliiĝi tiuflanke la forton kaj rapide establi kaj plifortigi la organizojn de baza konstruado—organizoj de projektado kaj de plenumado, kiuj bezonas kapablajn gvidantojn, progresajn teknikistojn kaj laboristojn. Por solvi la problemon de personaro nuntempe oni ĉefe devas elpreni kadrojn el la produktaj organizoj.”

Pli da Konstruantoj

Laŭ tiu ĉi direkto, kadroj, teknikistoj, teknikaj laboristoj el diversaj entreprenoj de peza kaj malpeza industrioj kiel tiuj de fero kaj ŝtalo, maŝino, teksado, ĥemio, el diversaj minoj kaj fabrikoj kaj ankaŭ el koncernaj fakoj pri produkto de la Centra Popola Registaro. de la grandaj administraj regionoj Nordorienta, Nordokcidenta, Orienta, Centrasuda kaj Sudokcidenta Ĉinio kaj de la provincaj kaj urbaj registaroj estas grandnombre kaj laŭplane transpostenigitaj en la bazan konstruadon por multe plifortigi ĝiajn organizojn.

Ekzemple al la Buroo por Baza Konstruado de la Ministerio de Pezaj Industrioj de la Centra Popola Registaro oni jam asignis kompetentan personaron kiel la ĉefajn kadrojn. Ĝi fondis institucion de projektado por baza konstruado. Kaj en Nordorienta Ĉinio fondiĝis jam dek unu specialaj inĝenieraj kompanioj por baza konstruado, kaj ankoraŭ aliaj estos fonditaj en diversaj lokoj en la tuta lando. El la entreprenoj de fera-ŝtala industrio en la tuta lando estis jam transpostenigita la unua trupo de miloj da kadroj kaj teknikistoj por la baza konstruado. La kadroj de baza konstruado de la fervojoj en la tuta lando plimultiĝis de junio 1952 ĝis la fino de oktobro je kvindek procentoj, kaj inter ili la teknikistoj plimultiĝis je okdek procentoj. La antaŭaj dek trupoj por esplorado kaj projektado estas vastigitaj en kvar Sub-buroojn por projektado en Nordorienta, Nordokcidenta, Sudokcidenta kaj Centrasuda administraj regionoj kaj dek ok trupojn por esplorado kaj projektado. Fondiĝis ankaŭ Ministerio de Geologiaj Aferoj. La laborforto de geologia serĉado disvolviĝas kaj la geologiaj esplortrupoj plimultiĝis de dudek naŭ en jaro 1950 ĝis okdek sep nun.

Ĉiuj produktaj organizoj elliveras la plej eminentajn kaj plej kapablajn kadrojn por la postenoj de baza konstruado.

La transpostenigo de kadroj estis bone preparita, kaj batalo estis kondukita kontraŭ konservativeco de la gvidantoj de certaj produktaj fakoj por ĝia efektivigo. Kvankam granda nombro da kadroj estas eltiritaj, tamen la produkta tasko estas ankoraŭ plenumita.

Ekzemplo de Anŝan

La Ŝtata Fera-Ŝtala Kompanio de Anŝan donas ekzemplon pri tio. Tiu kompanio grandamase sendis kadrojn, teknikistojn kaj kvalifikitajn laboristojn por baza konstruado. Estis entute eltiritaj pli ol tricent sesdek administrataj kadroj, pli ol ducent teknikaj kadroj kaj granda nombro da teknikaj laboristoj. Tiutempe la gvidantoj de certaj produktunuoj havis grandan skrupulon: "De kie ni prenu novajn kadrojn?" "Ĉu la produktado ne paraliziĝos?" Sed la postaj faktoj forigis al ili la skrupulojn.

Dum kaj antaŭ ol la kadroj estis eltirataj la Fera-Ŝtala Kompanio de Anŝan jam per diversaj rimedoj edukis kaj promociis el la pli malaltaj rangoj de vasta laborantaro pli ol sepcent kvardek personojn por postenoj pli superaj kaj pli ol du cent teknikaj laborantoj estas nove promociitaj por plenigi la vakantajn postenojn. Plie la aŭtoritatuloj alvokis por pliigo de produkto kaj plibonigo de labororganizo. Rezulte de ĉiuj ĉi tiuj aranĝoj, ne nur la produktado iras normale, oni eĉ superplenumis la difinitan taskon kaj kreis novajn rekordojn. En la dua sezono la superplenumo de produkto estis 11.7%, kaj en la tria, 5.1%. La fornego de malferma fajrejo n-ro 4 de la ŝtalfabrika kreis eminentan tutlandan rekordon de ses horoj kaj naŭ minutoj por produkti fornou da ŝtalo.

Nuntempe, la diversrangaj gvidantaroj en produktaj fakoj en la Fera-Ŝtala Kompanio de Anŝan konsistas el unu ĉefa kaj tri asistaj kadroj por ke oni povu ĉiam laŭbezone transpostenigi kadrojn por la baza konstruado.

Eduka Sistemo Reorganizita

Por pretigi lertajn manojn por la baza konstruado en 1953 kaj la sekvantaj pli grandskalaj bazaj konstruadoj, edukado de laborantoj estas farata per diversaj metodoj. Lastjare, la altlernejoj estis reorganizitaj. Fondiĝis institutoj de geologio, fero kaj ŝtalo, minado kaj metalurgio, kaj aeronaŭtiko, kiuj edukas altkvalitajn laborantojn por konstruado. Tiuj novaj institutoj faras edukadon sub nova direkto. La duono de la studentoj, kiuj lernas specialajn teknikojn, jam kapablos preni sur sin praktikajn laborojn post du jaroj. La nombro de lernantoj estas multe pligrandigita. Ekzemple la lernantoj en la Pekina Instituto de Geologio, atingis en nombro duoblon de la lernantoj kiuj estis edukitaj dum kelkaj dekoj da jaroj en malnova Ĉinio.

En diversaj lokoj estas starigitaj mallongperiodaj teknikaj lernejoj kiuj servas por eduki la kadrojn laborantajn kaj ankaŭ senokupajn laboristojn kaj intelektulojn, postlasitajn de Kuomintang. Tiuj lernejoj povas elbaki certajn teknikistojn en mallonga tempo. Sole en la administra regiono de Sudokcidenta Ĉinio estas starigitaj dek sep tiaj lernejoj, kies lernantoj kaj ekslernantoj kiuj nun laboras sur diversaj postenoj de baza konstruado post mallonga lernado, kune sumas 10,200.



Rikoltado en Seĉuan

Ting Ĉeng-ŝien

La laboristoj kiuj partoprenas bazan konstruadon estas ekorganizitaj. Antaŭe, multaj laboristoj laboris nur provizore por la baza konstruado dum certa periodo, kaj en la alia tempo ili laboras en alia loko. Nuntempe pro la grandskala entrepreno de baza konstruado en la tuta lando, miloj da provizoraj laboristoj fariĝis konstantaj, kaj laboras kontinue por la baza konstruado. Ili ricevas salajron antaŭ ol ili komencas labori. El diversaj urboj en la tuta lando ili venas al la laborejoj de baza konstruado sub la instigo de bela kaj feliĉa perspektivo. Ili diris kun ĝojo: "Ju pli frue la baza konstruado plenumiĝos, kaj efektiviĝos la industriigo de nia lando, des pli frue ni havos vivon pli feliĉan."

La plifortigo de organizoj de baza konstruado, la plifortigo de la armeo de kadroj kaj teknikistoj, kaj la organizado de grandnombraj laboristoj ebenigas la vojon por ĉiufanka plenumo de la granda baza konstruado tutlanda en 1953.

Sur vastaj areoj en Nordorienta, Nordokcidenta, Centrasuda kaj Orienta Ĉinio geologiaj ekspedicioj faris esplorojn pri minoj de kupro, fero kaj karbo. Estas jam ellaborita la projekto de nova Lanĉou-Sinkiang-a Fervojo. Baldaŭ komenciĝos la konstruado de la vojbaso. Estas en planado, projektado, esploro kaj preparo novaj ŝtalfabrikaĵoj, maŝinfabrikaĵoj kaj petrolo-rafinejoj. Malaperos la malnova agrikultura Ĉinio, jam leviĝas sur la horizonto industria novdemokratia Ĉinio.

— Trad. Honĉo —

Sanho-kluzo

Granda Centro de Drenado, Irigacio kaj Navigado de la Malsupro de Rivero Huaj

Ĉu Min-sin kaj Li Ming-huj

Sudokcidente de gubernio Huajjin en norda Kiangsu-provinco, ĉe la kuniĝo de Hungze-lago kaj Sanho (San-rivero), grandega konstruaĵo—Sanho-kluzo estas nun konstruata. Tio estas ĉefreguligilo de inundakvo en la malsupra Huaj-valo kaj la plej granda kluzo el ĉiuj en la tuta subjugada laboro de Huaj-rivero.


Antaŭ 1194, ne ekzistis la lago Hungze. En tiu jaro rompiĝis la digo de la Flava Rivero kaj ĝia fluego kunfluis kun Huaj-rivero kaj tiel ŝlimstopiĝis la estuaro de la lasta. De tiam la inundakvo kunvenanta el centoj da branĉoj de la supra partoj de Huaj-rivero haltis kaj stagnis sur la limloko de la du provincoj Kiangsu kaj Anhuej kaj iom post iom pligrandigis kelkajn lagetojn tie kaj formis fine la nunan lagon Hungze. Sed la lago estas ankoraŭ ne sufiĉe granda por enteni la inundakvon. Ĉiufoje kiam la inundakvo superis la kapaciton de la lago, ĝi rompis la digojn kaj inundis la vastan ebenejon en norda Kiangsu-provinco. Kiam okazis tia katastrofo, la feŭdaj regantoj de la dinastioj Ming kaj Ĉing povis fari nenion alian ol pasive konstrui ĉirkaŭdigon ĉirkaŭ Hungze-lago por devigi la inundakvon flui suden tra Sanho kaj la lagoj Paŭjing kaj Kaŭjoŭ en Jangze-riveron. Laŭ la hidrografia rekordo la plej granda kvanto de inundakvo enirinta en Hungze-lagon estis 14,600 m³/sek., dum la elirejo al Jangze-rivero povis ellasi nur 8,000 m³/sek. Sekve la superakvego ĉiam minacis la loĝantojn en norda Kiangsu-provinco, kie abunde produktiĝas rizo kaj kotono. En la pasinteco, la reakciaj regantoj, ignorante la vivon de la popolo, sur la orienta bordo de Interna Kanalo faris kvin "almarajn digojn", kiujn en okazo de pligranda inundakvo oni malfermis. Tion ili nomis "forkonduko en maron". Sed fakte, de tie ĝis la marbordo estas distanco de kelkcent kilometroj. Tial, okaze de superakvo, kiam la lokaj feŭdpotenculoj ekmalfermis

la "almarajn digojn", la areo de pli ol dek gubernioj en Liŝiaho-regiono, norda Kiangsu, tute subakviĝis. En seka jaro, kiam en supra Huaj-rivero malpliĝis la akvo kaj tiu en Hungze-lago elfluis sen restaĵo laŭ la vojo Sanho, tiam pro akvomanko oni ne nur ne povis irigacii eĉ la kamparon en Liŝiaho-regiono, sed ankaŭ la navigado sur la Granda Kanalo estis devigate haltigita. Jam de longaj epokoj la tieaj popoloj ĉiam aspiris forigi la teruran minacon.

Depost la fondiĝo de nova Ĉinio, la popola registaro decidis radikale subjugi Huaj-riveron por liberigi de inundo-minaco la tutan basenon. En la lastaj du jaroj oni jam parte subjugis la inundakvon. En la tria jaro oni celas plue subjugi la inundakvon kaj peni utiligi la riveron diverscele. Pro tio, la Komitato por Subjugo de Huaj-rivero decidis konstrui reguligan kluzon ĉe la buŝo de Sanho, por plie subjugi la inundakvon de Huaj-rivero, irigacii la kamparon de norda Kiangsu-provinco kaj remalfermi la navigadon inter Huaj kaj Jangze.

La Sanho-kluzo superas la Ĵunhozi-kluzon en skalo. La kluzo baziĝas sur la orienta bordo de la rivero. Ĝi estas malpli longa nur ol tiu de Tajpinkoŭ-kluzo de Jangze-rivero. La tuta laboro estas dividita en kvar partojn: La unua estas Sanho-reguliga kluzo por reguligi la akvonivelon de Hungze-lago kaj la flukvanton de Sanho-rivero. Ĝi longas 697.75 metrojn, larĝas 132 metrojn kaj altas 9.5 metrojn. Ĝia tuta bazo estas konstruita el ferbetono kaj ĝi havas entute 63 kluzpordojn kun po unu elektromotoro por fermi aŭ malfermi la kluzpordon. La dua estas la konstruado de herba digo sur la elirejo de Hungze-lago, kun longeco de 3½ kilometroj, por ŝtopi la akvofluan inter malnova Sanho kaj la lago, tiel levigante la akvonivelon por faciligi la surakvan komunikadon en Hungze-lago kaj faciligi la laboron de la bara digo konstruota malsupre de la herba digo. La tria estas la bardigo—300 metrojn longa, 18 metrojn alta kaj 100 metrojn larĝa ĉe la digsupraĵo. Tio estas farota post la finiĝo de la herba digo, precipe por ŝtopi la malnovan fluejon de Sanho, ke la lagakvo fluu tra Sanho-kluzo al Jangze-rivero kaj la akvokapacito de la lago estu bone reguligata. La kvara estas fosado de nova rivero malsupre kaj supre de la kluzo. Kiam ĉiuj ĉi kvar laboroj finiĝis, Hungze-lago kontribuos al la inundreguligo de Huaj-rivero, kaj ĝia amasigita lagakvo povos esti utiligata por irigacio, navigacio kaj eĉ por elektroproduktado.

Dum la projektado de Sanho-kluzo la Komitato por Subjugo de Huaj-rivero profitis de la antaŭinta teknika ideo de la Sovetia specialisto Bukov kaj alprenis la sukcesajn spertojn el la Ĵunhozi-kluzo, kaj el la laboro de Kingkiang, tial la projekto perfektigis altgrade. Ekzemple, pro la adopto de Sovetia sperto pri "senfosta kluzbazo" oni ŝparis por la ŝtato elspezon je 12 procentoj de la tuta konstrua elspezo kun pli granda sekureco de la kluzo. Por eviti difekton



Jundung-kluzdigo servas kiel valvo por kontroli la akvofluan el la Granda Kanalo en la Ĝeneralan Irigacian Kanalon de norda Kiangsu.

de la kluzbazo pro la forportado de la teraĵo fare de la subtera akvo kuranta sub la kluzbazo, helpate de Sovetiaj specialistoj niaj tekniklaborantoj starigis filtrilon malsupre de la kluzo, tiel garantianta ke la subbaza teraĵo neniam estas forportota de la subtera fluo. Krom tio oni konstruas malsupre de la kluzo moderigan akvujon kaj frapŝirmilon el cemento por ke la torenta akvo tra la kluzo estu malrapidigita kaj ne forlavu la riverliton. Cetere, la ambaŭflankaj bordmuroj ĉe la kluzo estas konstruitaj el cemento en "skatola formo" por moderigi la premon de la kluzo al ili. Tiuj progresaj strukturoj treege kontribuis al la ŝparo de materialoj kaj laboro kaj certigis la sekurecon de la kluzo.

Post finkonstruo, okaze de eksterordinara superakvego, Sanho-kluzo, kunfunkciante kun Kaŭliangkian-kluzo sur la Ĝenerala Irigacia Kanalo en norda Kiangsu-provinco, forkondukos la inundakvon, malgrandigos la flu-volumenon de Huaj-rivero kaj garantios la sekurecon de Liŝiaho-regiono en norda Kiangsu. En normala jaro, ĝi tenos la akvonivelon de Hungze-lago je pli ol 12.5 metroj kaj kondukos grandan kvanton da lagakvo en la Ĝeneralan Irigacian Kanalon por akvumi 25,800,000 muojn

da tero en norda Kiangsu. Krome, ĝi ankaŭ tenos la akvonivelon de la supra kaj meza partoj de Huaj-rivero kaj de la Ĝenerala Irigacia Kanalo en norda Kiangsu kaj tiel navigebligos ilin konstante. Ŝipoj ekvetuarntaj de la Flava Maro povos navigi supren laŭlonge de la rivero ĝis la regiono de Tapie-montaro kaj la urbeto Ulunzi en Honan-provinco. Post kiam ĉiuj ĉi naviglinioj remalfermiĝos, la kotono de norda Kiangsu, la rizo kaj tritiko de Liŝiaho-regiono, la salo de Huajpej, la karbo, fabo, gaŭliango de norda Anhuej-provinco kaj la lokaj produktaĵoj teo, bambuo k. a. povos esti sendataj al la urboj kaj vilaĝoj laŭlonge de Huaj-rivero; la industria produktaĵo de la urboj kiel Ŝanhajo, Usi, k. a., ekzemple ŝpinaĵo, ŝtofo k.a. estos ankaŭ liverataj al la kamparanoj loĝantaj apud la supra kaj meza partoj de Huaj-rivero. Post kiam la lagakvo estos subjugita, la fluo forkuranta tra la Sanho-kluzo povos ankoraŭ esti utiligata por elektroproduktado. La kompletigo de la regulatoro ĉe Hungze-lago kune kun la reĝustigo de la akvovojoj povos iom post iom sekigi la lagojn Paŭĵin, Kaŭjoŭ kiuj havas jam longan historion de 700 jaroj, kaj aperos 1,500,000 muoj da fekunda tero.

Trad. Venpino

Lerni kaj Konstrui Samtempe

Kiel formiĝis la teknikforto de la fundamenta konstruado en Anŝan

Ĉang-kung kaj Aj-ze

Ĉiufoje, enirinte en la ŝtalarbon Anŝan, en kiu la grandskala konstruado procedas, ni estas emociataj nereteneble, ĉar ĉi tie ni vidas brilan estonton de nia granda patrio. Antaŭ aprilo de la jaro 1952, tie, kie nun estas laborejoj de la fundamenta konstruado, estis nur malplena spaco, sed poste aperis grandskalaj kaj kortuŝaj laborscenoj. Miloj da laboristoj laboris streĉe, tage kaj nokte, ŝanĝante la aspekton de Anŝan per siaj cerboj kaj manoj. Tie nun estas vidataj altaj ŝtalskeletoj, vicoj da elektrofadenaj stangoj, amasoj da ŝtonrompaĵoj, sablo, model-tabuloj kaj ŝtaltraboj, kurantaj vagonaroj kaj aŭtomobiloj, muĝantaj gigantaj arganoj, ekskavatoroj, ebenigaj maŝinoj, ŝarĝa-maŝinaj maŝinoj; ĉie estas aŭdataj la sonoj de pumpiloj, elektraj veldiloj, aerpreniloj, cementtremigiloj kaj de diversaj metaloj kunfrapantaj. Sur la ĉefaj laborkampoj, kie oni laboras plej streĉe, eĉ trairi inter la homamasoj estas tre malfacile, ĉar ĉe la sama loko, en la sama tempo, troviĝas eĉ ses konstruaj kompanioj, laboras kelkdekoj da diversaj labortaĉmentoj—de alte supre en la aero, sur la tero, ĝis sub la tero profunde je dekkelkaj metroj, ĉiu anguleto de la laborkampoj estas okupata de laborantoj.

Laŭ la plano antaŭdecidita de la ŝtato, ekde la jaro 1952, en Anŝan devis fondiĝi unu post alia multaj fabrikoj kaj minejoj plej novtipaj, en kiuj oni prilaboros ĉion per maŝinoj, per aŭtomatoj. En tiuj fabrikoj kaj minejoj oni ne bezonos milojn da laboristoj por peza laboro, sed malmultajn laboristojn, kiuj direktas la mekanikojn kaj maŝinojn per multspecaj

elekto-prembutonoj, kaj produktos en mirinda rapideco ŝtalaĵojn, kiujn oni neniam produktis en ĉina historio, kaj kiuj estas urĝe bezonataj de nun en la grandskala ekonomia konstruado. La tri grandaj konstruoj komencitaj en la jaro 1952 estas nur komenco de tiu giganta plano.

Ĉiuj ja scias, ke konstruado de peza industrio de tia granda amplekso estas unuafoja en nia lando. Tion ni ne nur neniam spertis, eĉ kelkaj el ni neniam vidis. Sed dank' al la pasia laborado de la laboristoj de Anŝan, la helpo de la Sovetiaj specialistoj kaj la subteno de la tutlanda popolo, ĉiuj konstruoj procedas en tre mirinda rapideco. Unu el la tri projektitaj konstruoj komencitaj en lasta jaro estas jam plenumita pli ol 50 procentojn; la baz-konstruo de alia estas finkonstruita, kaj tie nun oni streĉe instalas maŝinojn; la refraktoriaj brikoj de la fandforno no. 8 estas kunmetitaj, nur restas kelkaj ekipaĵoj instalotaj. La koaksofornoj, ventoliloj, kaldronejoj k.t.p. de tiu konstrusistemo, ĉiuj estos finkonstruitaj akurate laŭplane aŭ antaŭdate.

La mirinda rapideco signifas ne tion, ke estis nenia malfacilaĵo, sed ĝuste tion, ke ni la malfacilaĵojn konkeris kun granda efikeco. Dum tiuj konstruoj, la plej granda malfacilaĵo estis tio, ke la konstruoj estas tiel grandskalaj kaj komplikaj, kaj postulas ekstreman precizecon en tekniko. Ekzemple, en pli ol cent diversaj bazokonstruoj de du konstruprojektoj la plej profunda terfosado atingis la profundecon de 18 metroj, la plej granda volumeno de tero fosita atingis pli ol tri mil

kubmetroj. La ŝtalstangoj uzitaj en tiuj bazokonstruoj varias en pli ol mil tipoj, kaj la dekmiloj da ŝraŭboj fiksitaj sur la bazo devas esti instalitaj tiel precize, ke inter ili troviĝu nenia diferenco de pli ol 3—5 milimetroj. Tamen tiuj estas ankoraŭ pli facilaj kompare kun la laboroj de geologia esploro kaj inĝeniera projektado. Por decidi la lokon de la fabrikoj, oni ekzamenis pli ol sep cent specojn da tero, kaj nur por tio oni bezonis pli ol unu jaron. La projektado estis laboro pli komplika. Desegnoj represitaj sole en la jaro 1952 sumiĝis pli ol milion tricent mil folioj, kiuj entute pezas 12.8 tunojn kaj longas 20 kilometrojn.

Kontraŭ tia giganta kaj komplika konstruado, nia teknikforto estas tre malgranda. Ekzemple, el dekmilanoj de la civila inĝeniera kompanio, nur 1.27 procentoj estas teknikistoj kaj 77 procentoj estas nespertaj ekzercigantaj teknikistoj kaj ĵus gradigitaj studentoj el universitatoj kaj kolegioj. El laboristoj 80 procentoj estis kamparanoj; al ili ne nur mankis laborsperto, sed eĉ al vivo en laborejo ili ne kutimiĝis. Sed oni ne malkuraĝiĝis antaŭ tiu situacio. Ekde lasta aprilo ĝis nun, tiu kompanio finfaris cent kaj tri konstruajn laborojn, inkluzive de terfosado je 150 mil kubmetroj, beton-verŝado por bazokonstruoj je 63 mil kubmetroj, metado de kloaktuboj je 31,000 metroj, oleŝmirado je 500 mil kvadrataj metroj, kaj konstruo de loĝejoj kaj lernejoj je pli ol 200 mil kvadrataj metroj. Krome, la maŝininstala kompanio, metalstruktura kompanio, elektrinstala kompanio k.t.p. same plenumis siajn taskojn en la similaj malfacilaĵoj.

Tio ne estas mirakloj nekompreneblaj. Tio estas rezulto de tio, ke la laboristoj kaj oficistoj en Anŝan pene lernis kaj sinforĝeseme laboris, helpate de la Sovetiaj spertoj kaj specialistoj, por gajni la plifruan industriiĝon de la patrio. Ekzemple, antaŭ la komenco de la grandskala fundamenta konstruado, la civila inĝeniera kompanio jam aranĝis, per la helpo de la Sovetiaj specialistoj, unu post alia sep akcesorajn uzinojn por kolekti sablon, ŝtonojn, fari ŝtalstangojn, modeltabulojn, lignaĵojn, cementon, kaj skoribrikojn, unu mekanikan stacion kaj unu laboristan brigadon. Tiuj ĉi unuoj organizis rapide la laboristojn, kiuj venis el la tuta lando, kaj funkciis kiel lernejoj, en kiuj laboristoj povas lerni rapide kaj tuj posedi la teknikon. Tio estas decida faktoro por plirapidigi la konstruadon kaj garantii la laborokvaliton. Ekzemple en la mekanika stacio, kiam ĵus alvenis maŝinoj aĉetitaj el Sovetio, la laboristoj ne povis uzi la maŝinojn kaj konfuziĝis gapante. Sed post lernado duonjara, ili povis uzi ĉiujn maŝinojn, eĉ aperis inter ili multaj eminentaj kondukistoj de argano, ekskavatoro, kaj ŝarĝa-malŝarĝa maŝino. Ili laboris kun granda efiko kaj plenumis grandegan laboron. La ekskavatoroj jam elfosis 80 mil kubmetrojn da tero, kaj la arganoj levis 50 mil tunojn entute.

Ni rimarku ankaŭ tion, ke el la kelkmil laboristoj kaj teknikistoj de la maŝininstala kompanio neniuj antaŭe instalis maŝinojn tiel komplikajn. Tamen, per la helpo de la Sovetiaj specialistoj, oni aranĝis unu post alia ses teknikkursojn por oficistoj de uzinoj, taĉmentestroj, teknikaj laboristoj kaj metilernantoj. Tio ne nur plialtigis teknikon de ĉiuj laboristoj kaj oficistoj, sed ankaŭ solvis la demandon pri manko de teknikforto.

Ili antaŭdecidis plenumi ĝis la fino de lasta oktobro 56 procentojn de la tutjara projekto, sed fakte ili plenumis 58 procentojn. Ekzemple, la radvojon no. 16 de la konstruo no. 0230, laŭ plano oni devis finfari en 13 tagoj, sed fakte, ĉar la laboristoj jam ellernis la teknikon en kurso, ili plenumis la taskon en ses tagoj. Similan ekzemplon oni povas prezenti, en la konstruo no. 0190: laŭ plano en septembro oni devis instali mekanikon pezan je 625 tunoj, sed fakte ili instalis 810 tunojn.

Ankaŭ admirinda estas la stato en la metalstruktura kompanio. En la jaro 1952, ĝia tasko estis kvinoble pli multe ol antaŭe, kaj krome la tempo estis pli prema, sed al la kompanio aldoniĝis nur 1700 novaj metilernantoj, kaj nenia maŝino kaj neniuj teknikistoj estis nove aldonitaj. Por solvi tiun malfacilaĵon, la direktoroj proponis al la laboristoj la metodon, ke la majstroj lernigu la metilernantojn kaj tiuj lastaj lernu en laboro kaj ekzerciĝu en laboro. Sed tiamaniere oni tro multajn laborilojn okupis, kaj malfacilaĵoj estis la laboro. La laboristoj do proponis novan metodon, ke vespere la majstroj instruu, dume la metilernantoj lernu, kaj tage la majstroj laboru, dume la metilernantoj observu, kaj ekzerciĝu kiam la laboriloj estas ne okupataj. Tiel ili sukcesis kulturi multajn novajn teknikajn laboristojn, kaj solvis multajn malfacilaĵojn. Ekzemple, antaŭe en tiu kompanio estis nur sesdek tri laboristoj por elektra veldo, kaj naŭ el ili tre ofte laboris aliloke ekster la kompanio, sed dank' al tiu metodo, nun en tiu kompanio estas kelkcent tiaj laboristoj, kaj kvarobliĝis la laborforto.

La grandskala fundamenta konstruado de Anŝan tiel marŝas rapide. Spite de ankoraŭ multaj malfacilaĵoj antaŭ ni, tamen la fakto jam al ni demonstras, ke ni povas konstrui la pezan industrion, ni povas konstrui nian patrolandon pli forta kaj pli bela!

Elĉinigi Ly Moje.

Kurantaj Aferoj

Multaj Filmoj en Lingvoj de Naciaj Minoritatoj


Multaj ĉinaj filmoj estas tradukitaj en mongolan, ujuvan kaj korean lingvojn kaj la Kantonan dialekton por la minoritatoj en Ĉinio, la loĝantoj en la sudaj provincoj, Hongkong, Makao kaj la transmaraj ĉinoj.

Dek kvar filmoj estis reproduktitaj lastjare en la Kantona dialekto, inkluzive de "La Blankhara Knabino", "La Ŝtalaj Batalantoj", "Ŝangĵaŭ-a Koncentrigejo" kaj "La Huaj-rivero Nepre Devas Esti Subjugita". Inter la ses filmoj reproduktitaj en ujuva lingvo estas "La Granda Unuiĝo de Ĉinaj Nacioj", "Liberigo de Tibeto", "Ĝoja Sinkiang-provinco" kaj "Rezisti Usonan Agreson kaj Helpi Koreion."

"La Granda Unuiĝo de Ĉinaj Nacioj" estas reproduktitaj en mongola lingvo, kaj "Rezisti Usonan Agreson kaj Helpi Koreion", kaj "La Ŝtalaj Batalantoj" en korea lingvo.

Ekde tiu ĉi jaro, filmoj estos produktitaj ankaŭ en Tibeta lingvo.

Kurantaj Aferoj



Parto de la Fero-ŝtala Uzino de Anŝan



Aplikinte progresajn Sove-tiajn metodojn, la ŝtalo-labor-istoj de tiu ĉi Fornego de Malferma Fajrejo N-ro 4 kompletigis fandon en la rekorda tempo de 6 horoj kaj 9 minutoj, superante la atingojn de simila forno en kapitalistaj landoj.

Konstruantoj de la popola Anŝan. Tiu ĉi modela betonmetanta teamo gvidata de Vang Ĉing-ĉung altigis laborefikon ĝis 136 procentoj dum la patriota laborkonkuro.

ANŜAN — Ŝtal-urbo de Ĉinio

En tri jaroj, la Ŝtata Fero-ŝtala Kompanio de Anŝan en Nordorienta Ĉinio jam komplete restarigis siajn instalaĵojn detruitajn de japanaj invadantoj kaj Kuomintangaj naci-perfiduloj, superplenimis ĉiujn siajn produktajn planojn kaj komencis novan konstruadon en granda skalo.



kubmetroj. La ŝtalstangoj uzitaj en tiuj bazokonstruoj varias en pli ol mil tipoj, kaj la dekmiloj da ŝraŭboj fiksitaj sur la bazo devas esti instalitaj tiel precize, ke inter ili troviĝu nenia diferenco de pli ol 3—5 milimetroj. Tamen tiuj estas ankoraŭ pli facilaj kompare kun la laboroj de geologia esploro kaj inĝeniera projektado. Por decidi la lokon de la fabrikoj, oni ekzamenis pli ol sep cent specojn da tero, kaj nur por tio oni bezonis pli ol unu jaron. La projektado estis laboro pli komplika. Desegnoj represitaj sole en la jaro 1952 sumiĝis pli ol milion tricent mil folioj, kiuj entute pezas 12.8 tunojn kaj longas 20 kilometrojn.

Kontraŭ tia giganta kaj komplika konstruado, nia teknikforto estas tre malgranda. Ekzemple, el dekmilanoj de la civila inĝeniera kompanio, nur 1.27 procentoj estas teknikistoj kaj 77 procentoj estas nespertaj ekzerciĝantaj teknikistoj kaj ĵus gradigitaj studentoj el universitatoj kaj kolegioj. El laboristoj 80 procentoj estis kamparanoj; al ili ne nur mankis laborsperto, sed eĉ al vivo en laborejo ili ne kutimiĝis. Sed oni ne malkuraĝiĝis antaŭ tiu situacio. Ekde lasta aprilo ĝis nun, tiu kompanio finfaris cent kaj tri konstruajn laborojn, inkluzive de terfosado je 150 mil kubmetroj, beton-verŝado por bazkonstruoj je 63 mil kubmetroj, metado de kloaktuboj je 31,000 metroj, oleŝmirado je 500 mil kvadrataj metroj, kaj konstruo de loĝejoj kaj lernejoj je pli ol 200 mil kvadrataj metroj. Krome, la maŝininstala kompanio, metalstruktura kompanio, elektrinstala kompanio k.t.p. same plenumis siajn taskojn en la similaj malfacilaĵoj.

Tio ne estas mirakloj nekompreneblaj. Tio estas rezulto de tio, ke la laboristoj kaj oficistoj en Anŝan pene lernis kaj sinforĝeseme laboris, helpate de la Sovetiaj spertoj kaj specialistoj, por gajni la plifruan industriiĝon de la patrio. Ekzemple, antaŭ la komenco de la grandskala fundamenta konstruado, la civila inĝeniera kompanio jam aranĝis, per la helpo de la Sovetiaj specialistoj, unu post alia sep akcesorajn uzinojn por kolekti sablon, ŝtonojn, fari ŝtalstangojn, modeltabulojn, lignaĵojn, cementon, kaj skoribrikojn, unu mekanikan stacion kaj unu laboristan brigadon. Tiuj ĉi unuoj organizis rapide la laboristojn, kiuj venis el la tuta lando, kaj funkciis kiel lernejoj, en kiuj laboristoj povas lerni rapide kaj tuj posedi la teknikon. Tio estas decida faktoro por plirapidi la konstruadon kaj garantii la laborokvaliton. Ekzemple en la mekanika stacio, kiam ĵus alvenis maŝinoj aĉetitaj el Sovetio, la laboristoj ne povis uzi la maŝinojn kaj konfuziĝis gapante. Sed post lernado duonjara, ili povis uzi ĉiujn maŝinojn, eĉ aperis inter ili multaj eminentaj kondukistoj de argano, ekskavatoro, kaj ŝarĝa-malŝarĝa maŝino. Ili laboris kun granda efiko kaj plenumis grandegan laboron. La ekskavatoroj jam elfosis 80 mil kubmetrojn da tero, kaj la arganoj levis 50 mil tunojn entute.

Ni rimarku ankaŭ tion, ke el la kelkmil laboristoj kaj teknikistoj de la maŝininstala kompanio neniu antaŭe instalis maŝinojn tiel komplikajn. Tamen, per la helpo de la Sovetiaj specialistoj, oni aranĝis unu post alia ses teknikkursojn por oficistoj de uzinoj, taĉmentestroj, teknikaj laboristoj kaj metilernantoj. Tio ne nur plialtigis teknikon de ĉiuj laboristoj kaj oficistoj, sed ankaŭ solvis la demandon pri manko de teknikforto.

Ili antaŭdecidis plenumi ĝis la fino de lasta oktobro 56 procentojn de la tutjara projekto, sed fakte ili plenumis 58 procentojn. Ekzemple, la radvojon no. 16 de la konstruo no. 0230, laŭ plano oni devis finfari en 13 tagoj, sed fakte, ĉar la laboristoj jam ellernis la teknikon en kurso, ili plenumis la taskon en ses tagoj. Similan ekzemplon oni povas prezenti, en la konstruo no. 0190: laŭ plano en septembro oni devis instalii mekanikon pezan je 625 tunoj, sed fakte ili instalis 810 tunojn.

Ankaŭ admirinda estas la stato en la metalstruktura kompanio. En la jaro 1952, ĝia tasko estis kvinoble pli multe ol antaŭe, kaj krome la tempo estis pli prema, sed al la kompanio aldoniĝis nur 1700 novaj metilernantoj, kaj nenia maŝino kaj neniu teknikisto estis nove aldonitaj. Por solvi tiun malfacilaĵon, la direktoroj proponis al la laboristoj la metodon, ke la majstroj lernigu la metilernantojn kaj tiuj lastaj lernu en laboro kaj ekzerciĝu en laboro. Sed tiamaniere oni tro multajn laborilojn okupis, kaj malarapidiĝis la laboro. La laboristoj do proponis novan metodon, ke vespere la majstroj instruu, dume la metilernantoj lernu, kaj tage la majstroj laboru, dume la metilernantoj observu, kaj ekzerciĝu kiam la laboriloj estas ne okupataj. Tiel ili sukcesis kulturi multajn novajn teknikajn laboristojn, kaj solvis multajn malfacilaĵojn. Ekzemple, antaŭe en tiu kompanio estis nur sesdek tri laboristoj por elektra veldo, kaj naŭ el ili tre ofte laboris aliloke ekster la kompanio, sed dank' al tiu metodo, nun en tiu kompanio estas kelkcent tiaj laboristoj, kaj kvarobliĝis la laborforto.

La grandskala fundamenta konstruado de Anŝan tiel marŝas rapide. Spite de ankoraŭ multaj malfacilaĵoj antaŭ ni, tamen la fakto jam al ni demonstras, ke ni povas konstrui la pezan industrion, ni povas konstrui nian patrolandon pli forta kaj pli bela!

Elĉinigi Ly Moje.

Kurantaj Aferoj

Multaj Filmoj en Lingvoj de Naciaj Minoritatoj


Multaj ĉinaj filmoj estas tradukitaj en mongolan, ujuvan kaj korean lingvojn kaj la Kantonan dialekton por la minoritatoj en Ĉinio, la loĝantoj en la sudaj provincoj, Hongkong, Makao kaj la transmaraj ĉinoj.

Dek kvar filmoj estis reproduktitaj lastjare en la Kantona dialekto, inkluzive de "La Blankhara Knabino", "La Ŝtalaj Batalantoj", "Ŝangĵaŭ-a Koncentrigejo" kaj "La Huaj-rivero Nepre Devas Esti Subjugita". Inter la ses filmoj reproduktitaj en ujuva lingvo estas "La Granda Unuiĝo de Ĉinaj Nacioj", "Liberigo de Tibeto", "Ĝoĵa Sinkiang-provinco" kaj "Rezisti Usonan Agreson kaj Helpi Koreion."

"La Granda Unuiĝo de Ĉinaj Nacioj" estas reproduktitaj en mongola lingvo, kaj "Rezisti Usonan Agreson kaj Helpi Koreion", kaj "La Ŝtalaj Batalantoj" en korea lingvo.

Ekde tiu ĉi jaro, filmoj estos produktitaj ankaŭ en Tibeta lingvo.

Kurantaj Aferoj



Parto de la Fero-ŝtala Uzino de Anŝan





Aplikinte progresajn Sove-tiajn metodojn, la ŝtalo-labor-istoj de tiu ĉi Furnego de Malferma Fajrejo N-ro 4 kompletigis fandon en la rekorda tempo de 6 horoj kaj 9 minutoj, superante la atingojn de simila forno en kapitalistaj landoj.

Konstruantoj de la popola Anŝan. Tiu ĉi modela betonmetanta teamo gvidata de Vang Ĉing-ĉung altigis laborefikon ĝis 136 procentoj dum la patriota laborkonkuro.




ANŜAN — Ŝtal-urbo de Ĉinio

En tri jaroj, la Ŝtata Fero-ŝtala Kompanio de Anŝan en Nordorienta Ĉinio jam komplete restarigis siajn instalaĵojn detruitajn de japanaj invadantoj kaj Kuomintangaj naci-perfiduloj, superplenumis ĉiujn siajn produktajn planojn kaj komencis novan konstruadon en granda skalo.




Parto de la nova Fabriko N-ro 1 konstruata ĉe Anŝan




Anŝan fariĝis lernejo por dekmiloj da novaj teknikaj kadroj. Veterana laboristo kaj du junaj metilernantoj




Konstruaj laboristoj laborantaj en alto estas ĉiuj provizitaj per sekurigaj rimenoj.





konstrui fundamenton de novaj fabrikoj 100,000 kubmetroj da
devas esti movitaj. Tia laboro estas pli kaj pli mekanigita.




30 - tuna argano
levas la ŝtalajn
trabojn de la
nova Anŝan.



Tiuj ĉi junaj mezuristoj estas tipaj el la gradi-
toj de la novaj teknikaj lernejoj enirintaj
la grandan laboron de landkonstruado.


NOVA ANŜAN LEVIĜAS

Instalado de peza
ekipajo en nova
fabriko



Tiuj ĉi novaj
domoj enloĝigos
la lavangon da
novaj laboristoj
ĉe Anŝan.





La Malgranda
Blanka Leporo en
sia arbara hejmo

Ĉe Pekina Infana Teatro

La Malgranda Blanka Leporo estas verkita de S. Mihalkov, bone konata Sovetia verkisto de infanaj rakontoj. Blanka Leporo, kiu havigis al si la bonan ĉasistan pafilon, pensas, ke li povas trakti la fivulpon per si mem. Sed li trovigis en danĝero kiam la pafilo montriĝis ne ŝargita en kriza momento. Nur la kunlaboro de lia najbaro, Bruna Leporo, savis lin tiutage. Blanka Leporo kaj la juna rigardantaro de la Infana Teatro ambaŭ lernas valoran lecionon en ekscita maniero.

La Persikoj Maturas de Jen Ta-lin rakontas kiel trupo de junaj pioniroj helpas la maljunan posedanton de persikarbo malgraŭ serioza miskompreno kiu igas lin suspekti ke ili venis ne protekti, sed prirabi lian arbon. Ĝi finiĝas tute ĝoje kiam la trupo savis liajn persikojn de ŝtormo.



Deŝirado de la
persikoj en *La
Persikoj Maturas*.

Armiloj Fariĝas Agrikulturaj Instrumentoj

Kaŭ Ĉeng

En septembro, 1952, ege ardis la produktokonkurso en nia fabriko. Ni ĉiuj estis aktive fabrikantaj mal-karajn sed bonkvalitajn novtipajn agrikulturajn instrumentojn por la kamparanoj. Supre en la mezo de la laborejo pendis transverse flirtanta ruĝa ŝtofo kun la slogano: *Plialtigo de Produktokvanto Estas Pli-fortigo de la Forto por Defendi Pacon.*

Ŝiaŭ Tie-lin kaj Ĉoŭ Vang, kiuj laboras ĉe fand-forno, venis tiumatene unu horon pli frue ol ordinare. Finbalainte la teron ĉirkaŭ la forno, ili supreniris la duan etaĝon por helpi Fanĉjon kaj Jaŭĉjon aranĝi amasojn da "materialo," kiu estis Usona-fabrikitaj maŝinpafiloj, japanaj fusiloj, bajonetoj kaj diversspecaj bataliloj...Unuvorte preskaŭ ĉiaj armiloj uzitaj de la malamiko estis troveblaj ĉi tie. Ĉiuj ĉi tiuj armiloj estis nun rompita kaj plejparte ne plu en siaj propraj formoj, sed ja ĉiu ajn persono povis rimarki por kio estis uzitaj ĉi tiuj rustiĝintaj fusiltuboj kaj nigraj fer-pecoj! Neordinara sento ondadis en nia brusto kiam ni estis transformantaj ilin en agrikulturajn instrumentojn.

Tenante en sia mano fusiltubon, Majstro Ŝiaŭ diris al Majstro Ĉoŭ, "Ĉi tiuj fiuloj ne plu kuraĝos nin atenci. Niaj doloraj tagoj jam forpasis por ĉiam. Ĉu vi vidis la nove konstruitan loĝejon por laboristoj de nia fabriko? Hej, vere pompa! Kun grandaj kaj helaj vitrofenestroj, neĝblankaj muroj, pura cementa planko kaj belaj kuirejetoj. Ĉu vi registriĝis?"

"Mi registriĝis? Por kio? Unuopulo!" diris Majstro Ĉoŭ, ekmalfermegante siajn grandajn okulojn.

"Kie estas via edzino?" demandis Ŝiaŭ Tie-lin.

"Mortinta!" ekkoleriĝis Majstro Ĉoŭ, kun ekstremo de siaj brovoj.

"Kiel ŝi mortis?"

Prenante du pecojn de la Usona-fabrikita maŝin-pafilo, Majstro Ĉoŭ stariĝis. Li diris, "Ĉiuj laboristoj en mia antaŭa fabriko sciis kiel mortis mia edzino... Estas ne mirinde ke eĉ vi ne scias kiel ŝi mortis, ĉar mi estas transigita ĉi tien malpli ol tri monatojn."

Majstro Ŝiaŭ scivoleme petis, "Diru al mi."

"Unu jaron antaŭ la liberigo, iutage kiam mi estis laboranta en fabriko, entrudis mian hejmon tri Usonaj soldatoj. Tiuj brutoj intencis perforti mian edzinon. Indignante mia edzino donis al tiuj Usonaj banditoj kelkajn fortajn vangfrapojn. La Usonaj soldatoj ekpafis kaj mortigis ŝin, per portebla maŝinpafilo, laŭ onidiro. Trafis ŝian bruston kvin kugloj en vico! Mia apenaŭ dujara filo ankoraŭ kuŝis apud sia patrino kiam li mortis." Majstro Ĉoŭ parolante jetis la rompitan pecon de Usona-fabrikita maŝinpafilo en la fera-mason, eligante kraktintojn. "Probable en ĉi tiu amaso de feraĵoj estas la maŝinpafilo per kiu oni mort-pafis miajn edzinon kaj filon!" Ruĝiĝis la okuloj de Majstro Ĉoŭ, plenaj je indignaj larmoj.

Jaŭĉjo kaj Fanĉjo premfermis siajn buŝojn bruspirante.

"Al kiu ajn el ni, ĉinaj popolanoj, povis okazi en la pasinteco tia afero kia okazis al vi. Prenu min mem

kiel ekzemplon. Rigardu!" parolis Majstro Ŝiaŭ, montrante la obusŝelojn alte amasigitajn kiel monteto sur la herbejo ekster la fenestro. "Mi bone rekonas ke tiuj estas Usona-fabrikitaj obusŝeloj. Nun ni faras el ili fanditajn pecojn por la ĉevaltiraj plugiloj. Aŭskultu min! Ne longe post la kapitulaco de Japanio kiam mi ankoraŭ estis kamparano kaj servis kiel milicano, mi vidis propraokule ke la bandit-armeo de Kuomintang uzis ĝuste tiujn samajn obusojn fabrikitajn de Usono por detrui nian tutan vilaĝon. En la daŭro de duontago nia ĵus konstruita kvinĉambra kabano fariĝis amaso da lignokarbaĵo kaj terbuloj...Post la forkuro de la bandit-armeo ni konservis kelkajn ne eksplodintajn obusojn kiuj tute similis al tiuj amasigitaj en nia fabriko kaj sur kiuj, estis ankaŭ gravuritaj Usonaj vortoj. Feliĉe la liberigo alvenis frue, alie, hm, mi ne scias kiom da senkulpaj pacamaj popolanoj ankoraŭ mortigos kaj kiom da malfacile konstruitaj domoj ankoraŭ ruinigos tiu amaso da diablajoj!"

Tiam supren venis Vuĉjo, la transportisto de materialo. Li nur aŭdis la voston de la parolo de Majstro Ŝiaŭ kaj tuj ĝin daŭrigis, "La armiloj fabrikitaj de Usono kaj Japanio ĉiuj nun fariĝas niaj militkaptitoj, ha, ha!"

Majstro Ŝiaŭ diris, "Kiam la bataliloj falis en la manojn de ni ĉinaj laboristoj, ni transformas ilin en novajn instrumentojn de paca konstruado por pliigi la porpacan forton."

"Ju pli grandiĝas la porpaca forto, des pli sen-poviĝas la militagentoj," diris Vuĉjo.

Majstroj Ŝiaŭ kaj Ĉoŭ helpis Fanĉjon kaj Jaŭĉjon zorgeme enmeti la rompitaĵojn en la fandfornon.

Ekbatis la kvara horo. Tuj Majstro Ŝiaŭ faris fajron en la forno kaj fermis ĝian pordon. Majstro Ĉoŭ gestis al Fanĉjo kaj tiu ĉi lasta surturnis la komutilon senprokraste. En la fandfornon la elektra ventumilo enblovadis kaj en la forno furioziĝas fajro. Iom post iom la nigre bluaj kaj rustkoloraj rompitaĵoj de la bataliloj fariĝas purpuraj, orangkoloraj kaj finfine brile ruĝaj. Malmola ŝtalo fandiĝas, roze ruĝiĝas, kaj fariĝas fluanta fluido. Tra la ventotruo oni povas klare vidi: La brile ruĝa fandita fero rampas kaj rampas sur la granatkoloraj koaksaj masoj kaj jen ĝi ekgutadas malsupren.

Ree venis Vuĉjo puŝante materialĉaron. Lasinte la ĉaron, li elpoŝigis leteron kaj ĝin svingis al Majstro Ŝiaŭ, dirante, "Jen letero por vi, Majstro Ŝiaŭ."

Majstro Ŝiaŭ ne havis tempon legi; transpreninte la leteron, li enigis ĝin en sian pantalonpoŝon. Li staris apud la forno, ekscitante la fajron per kurba fajrostango tra la elirejo de ferfluido. Fu, fu, fu, elsaltas flamoj. Ĉ, c, c, disŝprucas rapide sparkoj kaj fajreroj. Ruĝaj fajreroj ruliĝas sur la tero kaj belaj orkoloraj sparkoj dissaltas en la aero. La ujo por ferfluido estas alportita. Post dekdu minutoj, la orkolora ferfluido elfluas kiel fajroserpento kaj enverŝiĝas en la ujon. Kiam la ujo estas plenigita de la ferfluido, Majstro Ĉoŭ ekprenas la ŝtopstangon kaj ŝtopas la elirejon de fer-

fluido per argila koto. Fu, fu, fu, la fajro en la forno brulas pli vivece. La ferfluido enverŝita en la sablajn muldilojn rapide solidiĝas kaj fariĝas la ambaŭflankaj reguligaj tabuloj de la ĉevaltiraj plugiloj.

Majstro Ŝiaŭ elpoŝigis la leteron kaj ridante ĝin legis, dum lia vangharplena vizaĝo ruĝiĝis pro ĝojego. Majstro Ĉoŭ kaj Jaŭĉjo rapide demandis, "De kiu venis via letero, Majstro Ŝiaŭ? Kio estas skribita en ĝi?"

"De mia juna frato. Li skribis ke ilia interhelpa grupo aĉetis en ĉi tiu printempo tri novajn plugilojn faritajn de nia fabriko..." Apenaŭ fininte sian parolon, Majstro Ŝiaŭ malfermis la ventotruon kaj ekscitis la fajron per la granda fera fajrostango, eligante kelkajn fajrerojn kiuj flugis al li kaj post palpebrumo malaperis; tamen aliaj pli grandaj fajreroj ree al li flugis...

Tuj kiam Majstro Ŝiaŭ fermis la ventotruon, Majstro Ĉoŭ kaj Jaŭĉjo refoje demandis, "Kio estas skribita en la letero?"

Majstro Ŝiaŭ transdonis la leteron al Ĉoŭ kaj diris, "Legu mem kaj vi ekscios."

Kvankam Majstro Ŝiaŭ jam transdonis la leteron al Majstro Ĉoŭ, tamen li ankoraŭ laŭtvoĉe diris dum laborado, "De kiam la interhelpa grupo de mia frato uzis la ĉevaltirajn plugilojn faritajn de nia fabriko, la produktokvanto de ĉiu muo pligrandiĝis. Ni nur menciu la aŭtunajn rikoltojn. En ĉiu muo rikoltiĝis meznombro 890 ĝinoj da maizo aŭ 735 ĝinoj da milio... La produktokvanto plimultiĝis pli ol 70 procentojn kompare kun tiu de la lasta jaro. Li diris ke ĉiuj kamparanoj ŝatas ĉi tiajn novajn plugilojn kaj esperas ke ni laboros pli energie por produkti pli multe da novaj agrikulturaj instrumentoj por ili. Li diris krome ke pro la abunda rikolto konstruiĝis por lia interhelpa grupo dudek novaj domoj ĉijare..."

Majstro Ŝiaŭ aspektis eksterordinare energi-plena kaj li laboris streĉe kaj ekscitiĝe.

El sia taglibro li deŝiris folion da blanka papero kaj faradis notojn sur ĝi per krajono kiam ajn li trovis ŝancon. Neniu sciis kion il skribis. Li skribis laborante kaj ridis skribante. Kiam komenciĝis laboro en la sekvinta tago, li jam finskribis tri plenajn paĝojn da krajone skribitaj vortoj.

En la kvara horo posttagmeze de la sekvinta tago, aro da homoj venis de malproksime. Inter ili troviĝis la fabrikestro, la ĉefingenero, kaj ankoraŭ kelkaj fremduloj. Iu flustris, "Refoje venas pririgardi internaciaj amikoj."

Majstroj Ŝiaŭ kaj Ĉoŭ daŭre laboris kiel kutime.

La fabrikestro akompanis kelkajn delegitojn de la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj, tra la herbejo sur kiu estis amasigitaj Usono-fabrikitaj obusĉeloj kaj maŝinpafiloj kaj japanie-fabrikitaj fusiloj kaj bajonetoj, al la fandforno.

Preninte pecon da fero, la fabrikestro respondis la demandon de la internaciaj amikoj, "Tiuj amasigitaj pafiloj kaj bajonetoj estas unue transportitaj al la forĝejo por esti dispecigitaj en tian formon kaj poste al la forno por esti fanditaj kaj pli poste mulditaj en la pecojn por la ĉevaltiraj plugiloj...Tie kuŝantaj en vicoj estas la pretaj ĉevaltiraj plugiloj." Ridante la fabrikestro montris al ili la senfine longajn vicojn da novaj plugiloj ekster la laborejo.

Iu dika, blankhara delegito ekprenis la de Majstro Ŝiaŭ flanken ĵetitan taglibron kaj parolis ion al la interpretisto. La interpretisto demandis Majstron Ŝiaŭ, "Kies kajero ĝi estas?" "Mia," respondis Ŝiaŭ. "Por kio vi uzas ĝin? Por lernado aŭ por...?" la interpretisto demandis plu.

"Por skribi tagnotojn kaj ankaŭ leterojn," diris Majstro Ŝiaŭ.

Aŭdinte tion kion la interpretisto tradukis, la pacdelegito tuj remetis la taglibron. La interpretisto klarigis, "Ili ne legas privatajn taglibrojn kaj leterojn."

"Miaj taglibro kaj leteroj enhavas nenion sekretan, kaj ĉiu ajn povas legi ilin," diris Majstro Ŝiaŭ, transdonante al la interpretisto la tri paperfoliojn el la taglibro. "Jen estas mia ĵus skribita sed ankoraŭ ne finita letero al la familio. Se li volas scii kion ni, ĉinaj laboristoj, pensas en la koro, ĝin traduku al li."

Por superi la zumantan sonon de la elektra ventumilo, la interpretisto parolis eksterordinare laŭte kiam li tradukis.

"Kara frato: Via letero ricevita. Mi legis ke vi kulturis la teron per la de ni fabrikitaj ĉevaltiraj plugiloj kaj pliigis la produktokvanton pli ol 70 procentojn. Vi estas tre ĝoja, kaj ankaŭ mi. Sed, se vi scios el kio estas fabrikitaj la novaj plugiloj kiujn vi uzas kaj kun kia rapideco ni ilin produktas, certe vi fariĝos multe pli ĝoja. La obusoj, maŝinpafiloj, fusiloj kaj bajonetoj de la Usonaj kaj japanaj diabloj kiuj mortigis per ili sennombrajn, senkulpajn, pacajn loĝantojn kaj detruis sennombrajn vilaĝojn, nun falis en niajn manojn, en la manojn de la ĉina popolo. Ni faras el ili novajn agrikulturajn instrumentojn kaj igas ilin servi al paca konstruado. Kara frato, ĉu vi ne esperas ke ni fabrikos ĉevaltirajn plugilojn kun pli da energio? Nu, la rapideco de nia produktado eble estas pli granda ol vi supozas. Sub la kondiĉo ke ni pliigis nek laboristojn nek maŝinojn, la produktokvanto de nia fabriko en junio ĉijara 95-procente superis tiun en januaro kaj en aŭgusto ĝi estis 2.5 obloj de tiu de junio. Por bonvenigi la Nacian Feston kaj la Packonferencon de la Azia kaj Pacifika Regionoj, nia planita produktokvanto en septembro 35-procente pliigis kaj la tasko tiumonata estis plenumita dek tagojn antaŭdate. Pro kio ni, ĉina laboristaro, estas tiel energiaj? Ĉar ni havas la gvidadon de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj ĉar ni arde kaj sincere amas pacon. Pro kio ni arde amas pacon? La kialon ja ĉiu ĉino klare scias: Ĉar ni ĉiuj suferis de imperiismo kaj Ĉiang-banditaro kaj ĉar ni ĉiuj estas popolanoj de nova Ĉinio kaj havas noblan kaj altan idealon kaj pli kaj pli feliĉan morgaŭon. Nuntempe, ni..."

La interpretisto tradukis ĝis kie estis skribita la letero.

Absorbite aŭskultis la internaciaj amikoj de komenco ĝis fino. Post la finiĝo de la tradukado, la blankhara internacia amiko, ne petante helpon de la interpretisto, etendis sian dikfingron al Majstro Ŝiaŭ kaj parolis nelerte en la ĉina lingvo.

"Nova Ĉinio...popolo...paco!..."

La brile ruĝa ferfluido ondante verŝiĝis kaj fajreroj dissaltis en la aero, ruĝigante ĉies vizaĝojn per siaj rebriloj.

Trad. Cipao Nin.

Patriota Aktorino Ĉang Ŝiang-ju

Kiang Pu

I. Ŝia Historio

Ĉang Ŝiang-ju naskiĝis en Kung-gubernio, Honan-provinco. Ŝi estas nun tridekjara. Dum ŝia infanaĝo, la familio estis en malriĉeco kaj la patro estis laboristo en karbomino. Ŝi eklernis la arton de aktoro kiam ŝi estis naŭ-jara. Pro siaj talento kaj diligenta lernado, ŝi gajnis por si famon en Kajfeng (ĉefurbo de Honan) en sia dektrijara aĝo.

Post la eksplodo de la kontraŭ-japana milito je la sepa de julio (1937) ŝi estis persekutata de naciperfiduloj kaj specialaj agentoj, pro tio, ke ŝi ludis rolon en kontraŭ-japanaj dramoj. Lakeoj de la reakciularo ĵetis mangrenadon en ŝian tualetejon. Feliĉe ŝi ne estis en la ĉambro, tial ne estis murdita.

Ekde tiam ŝi ne plu povis resti tie kaj iris al la Nordokcidento de Ĉinio.

La reakciularo ne valorigis artiston. Precipe kiam aktorino jam akiris iom da sukceso en sia arto, eĉ pli da persekuto kaj pli da subpremo tiu suferis. Same estis la sorto de Ĉang Ŝiang-ju en la malnova socio. En Sian, en Lanĉou... ĉie ŝi suferis insulton kaj subpremon. Dumtempe, ŝi estis foje devigita forlasi la aktoran vivon por pli ol jaro.

Tiel ŝi travivis tagojn plenigitajn je sango kaj larmo dum dek ok jaroj.

Post la liberiĝo stariĝis la aktoroj samkiel la tutlandaj popolanoj. Sub la prizorgo kaj eduko de la Popola Registaro, Ĉang Ŝiang-ju tre rapide altigis sian nivelon en politiko kaj kulturo; kiel reprezentanto de artistoj ŝi partoprenas diversajn politikajn agadojn. Ŝi estas komitatano de la Literatura kaj Arta Federacio de Centra-suda Regiono de Ĉinio, popola reprezentanto de Honan-provinco; en la Nordokcidento, ŝi estas plenuma komitatano de la Literatura kaj Arta Federacio de Nordokcidenta Ĉinio, komitatano de la Ĉeffilio de la Asocio por Defendo de Mondpaco, reprezentanto de la Virina Federacio de la Nordokcidento, plenuma komitatano de la Virina Federacio de Kansu-provinco kaj tiu de la urbo Sian, popola reprezentanto de Kansu-provinco, kaj de la urboj Sian kaj Lanĉou. Ŝi tial profunde sentas la diferencon inter la nova kaj la malnova socioj. Nun, la politika pozicio de la aktoraro estas senprecedence altigita. Ŝi iam, kun kortuŝeco kaj ĝojo diris al siaj ĉirkaŭantoj: "Post la liberiĝo, ni artistoj vere stariĝis. Nun mi estas efektive homo. Mi ne nur ne plu estas rigardata kiel 'malestimata aktoro',



Ĉang Ŝiang-ju (meze staranta) en Moskvo post partopreno al la Popola Kongreso por Paco en Vieno.

sed ankaŭ estas estimata de la popolo, fariĝas glora reprezentanto kaj komitatano. Tio ne estus realigebla sen la Ĉina Komunista Partio. La popolo ame prizorgas pri mi, alte min taksas kaj donas al mi edukon. Se mi ne bone servus la popolon, kiel maldankema mi estus al Prezidanto Maŭ! Mi devas fidele prezenti la laborantan popolon, prikanti la laborantan popolon per mia arto; kiom longe mi vivos, tiom longe mi kantos por la popolo."

Ŝi prezentis kaj re-verkis iujn novajn dramojn, aldonante al ili sian artan kreon. Ili estas ĉie bonvenigataj de la granda amaso.

Kiam la Ĉef-oficejo de la Asocio por Defendo de Mondpaco anoncis la alvokon varbi kontribuojn por aeroplanoj kaj pafiloj por la Volontuloj en Koreio, ŝi komprenis la bezonon de la patrio. Unue, la de ŝi gvidata dramo-

trupo, "Ŝiangju" decidis prezenti foje en ĉiu monato por kontribuo, donante la tutan enspezon por la aĉeto de la aeroplano "Lusin" por kontribuo. Tamen ŝi ankoraŭ pensis ke ŝi ne kontribuis sian tutan forton, tial ŝi decidis mobilizi la tutan trupanaron mem kontribui unu aeroplanon.

Ĉi tiu decido unue elvokis de iuj miron kaj dubon. Sed Ĉang Ŝiang-ju tre firme respondis: "Kiam la Volontuloj batalas kontraŭ la malamikoj sur la fronto meze de granda malfacilo, estas ja nenio ke mi iom ŝvitas en la postfronto! Kion la patrio postulas min fari, tion mi faros." Kvankam ŝi ne malsufiĉe antaŭkalkulis la renkontotajn malfacilaĵojn, tamen ŝi diris kun persista memfido: "Ĉiuj malfacilaĵoj povos esti konkeritaj kondiĉe ke estos helpo kaj subteno de la amaso." Tiel ŝi unue forvendis sian tutan posedaĵon—aŭtomobilon kaj orajn ornamaĵojn, enmetis la sumon de kvardek milionoj en la Sian-a Filio de la Ĉina Popola Banko, malfermante kurantan konton sub la nomo de la aeroplano "Dramo-trupo Ŝiangju", ŝi ankaŭ pretigis sumon por uzo dum ĉirkaŭiranta prezentado; ŝi helpis la trupanojn aranĝi por iliaj postrestantaj familioj; ŝi sendis siajn kvar infanojn al vartejo. Kiam ĉio estis aranĝita, ŝi ekvojaĝis tra la lando gvidante la tutan trupon kaj okdek-kelkajn lernantojn, prezentante por kontribuo. Ĉie kien ŝi iris, ŝi kaj la trupo estis arde bonvenigataj kaj subtenataj de la Popola Registaro kaj la granda amaso.

Dum la tempo de prezentadoj por kontribuo, Ĉang Ŝiang-ju kaj la tuta trupo ankaŭ partoprenis prezenta-

don por la vunditoj en la Armea Hospitalo. Niaj plej amindaj batalantoj vunditaj por defendo de paco, forgesis sian doloron, kaj rigardis sian ludon en alta spirito kun fiksjaj rigardoj, dum ruĝa brilo de ĝojo kaj ekscito aperis sur iliaj vizaĝoj. Tiun tagon, Ĉang Ŝiang-ju estis en malsano, sed ŝi serioze ludis sen iomete da malprecizo. Unu vundita kamarado skribis la vortojn "servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, por la protekto de la familio kaj defendo de la nacio" sur koloran standardon kaj ĝin prezentis al Ĉang Ŝiang-ju kaj la dramo-trupo "Ŝiangju" kiel memorajo. Tiu standardo estas inspiro por la dramo-trupo pli antaŭen iri.

La dramo-trupo "Ŝiangju" sub la gvidado de Ĉang Ŝiang-ju jam kutimigis sin al la bona vivmaniero hardita kaj simpla. Por ke la tasko de kontribuo estu plenumita, ili kiel eble plej ŝparis en la elspezo kaj ĉiu trupano prenis nur la minimuman vivsubtenan sumon.

La ĉiutaga enspezo de la dramo-trupo estis entute kontribuita krom la necesaj elspezoj. Ĉang Ŝiang-ju mem ankaŭ senescepte kiel ĉiuj aliaj trupanoj, vivis la plej ŝpareman vivon.

La plano kontribui unu batal-aeroplanon nomatan "Dramo-trupo Ŝiangju" estis super-plane plenumita en mallonga tempo. La novaĵo estis vaste sciita tra la lando, kaj sur la batalfronto en Koreio. Tio ege inspiris niajn Volontulo-batalantojn kuraĝe luktantajn kontraŭ la malamiko en la fronto.

Je la 25a de marto lastjare kiam Hong Sun-ĉel, ĉefo de la Delegitaro de la Korea Popolo al Ĉinio kaj fama korea poeto, skribis al Ĉang Ŝiang-ju kaj ŝia dramo-trupo, laŭdante tiun ĉi ŝian patriotan agon, li diris ke tio estas "glora paĝo en la historio de la grandioza kampanjo rezisti kontraŭ Usono kaj helpi al Koreio." La poeto daŭre skribis:

"Kamaradino Ĉang Ŝiang-ju, vi ja plenumis grandan kuraĝan faron. Pere de via praktiko, vi montras vin vera patriota artisto de Maŭ Ze-tung-a epoko, plena je fiero kaj braveco. Pere de la scenejo vi donis pezan frapon al la kanibalo—la Usona invadanto. Via sento de justeco, via senlima brulanta lojaleco al la patrio jam trovis laŭdojn kaj tertremigajn aplaŭdojn de la granda amaso..."

Ĉe la fino, Hong kuraĝigis nian patriotan artistinon:

"Mi esperas, ke vi kaj ĉiuj kamaradoj en la trupo daŭre, senĉese disvolvovos tiun ĉi honoran tradicion en la batalo por la popolo kaj por la defendo de la mond-paco. Mi esperas ke vi ĉiuj marŝos antaŭen pli kuraĝe kaj pli firme." Direktite al Ĉang Ŝiang-ju kiel la reprezentanto, tio ankaŭ estas arda kuraĝigo al ĉiuj aktoroj kaj aktorinoj de nia tuta lando.

II. Ŝia Arto

Ĉang Ŝiang-ju estas talenta opero-aktorino. Per ŝiaj klopodoj la Honan-opero akiris la favoron de amasoj en diversaj lokoj, kaj ili subtenas ŝin en ŝia patriota ago. Tio estas neapartigebla de ŝia kreado en la opera arto.

Ŝia ĉefa kreado estas en la muziko de la Honan-opero. La melodioj de la Honan-opero antaŭe estis tre simplaj, sen multe da ŝanĝoj. Tiuj kiuj estas uzablaj por esprimo de diversaj emocioj nur nombriĝas dekkelkaj. Kvankam ekzistas multaj nomoj de melodioj, tamen dum la prezentado ankoraŭ ne sufiĉas por specialaj sentdetaloj. Dum la lastaj dudekkelkaj jaroj, aktoroj kaj aktorinoj de la Honan-opero jam penas por

superi tiun ĉi limon, ekz., ensorbi la Kunĉju-melodiojn de la Pekina opero, aŭ popolajn ariojn de Honan kaj Ŝensi. Inter ili la plej elstara kaj la plej originala estas Ĉang Ŝiang-ju.

La Honan-opero estas populara nur en mallarĝa sfero. La ĉefaj specoj estas Jusi-melodio kaj Ŝiangfu-melodio. La diferenco inter la du estas tio, ke la antaŭa postulas la uzon de la vera, natura voĉo, nomata la "granda origina tono", dum la posta postulas la uzon de afektita voĉo, nomata la "dua origina tono". Dum la kantado laŭ la Jusi-melodio la tono malaltiĝas ĉe la fino, la sono estas ronde-mola, ĉiu silabo estas klare artikigita, taŭga por esprimi heroan emociion. La Ŝiangfu-melodio ofte uzas Honan-dialekton en la dialogo. Dum kantado la voĉo estas alta kun multe da varioj, taŭga por esprimi la ĝojan senton.

Ĉang Ŝiang-ju unue lernis la Jusi-melodion. Ŝia kreado en la muziko de la Honan-opero estas surbaze de la Jusi-melodio, utiligante la avantaĝojn de la Ŝiangfu-melodio. Krome, ŝi ne meĥanike limis sin al la ritmoj de la origina melodio kaj la fiksjita formo de la Honan-opero, male, ŝi libere ilin utiligas laŭ la postuloj de la karakteroj kaj sentoj de la ludata rolo. Samtempe, ŝi utiligas en la melodioj de la Honan-opero la tonon de aliaj specoj de operoj. Ŝi bone konas la Pekinan operon, Pingkju, Cinĉiang, Hopej-pangze, Juekju, Honan-ĉjuze, Honan-ĉuejze kaj aliaj popolajn ariojn de Honan-provinco. Ŝi taŭge adaptas ilin en la melodioj de la Honan-opero, sen rompo de la unuiĝo kaj perfekteco de la muzika stilo, ŝi sukcesis sin liberigi el la limo de la melodioj de la origina Honan-opero. Tiel, estas prave dirita ke ŝi faras novan kreon en la formo de Honan-opero.

Ĉang Ŝiang-ju tre lerte kontrolas siajn voĉon kaj spiron. Ŝiaj esprimoj de sentoj estas vivecaj kaj riĉaj; ŝi klare artikigas la silabojn de la vortoj. Ŝia voĉo estas mola en koloro, larĝa en volumeno, kaj ampleksa en limo, kaj eleganta en ritmo. Tial ŝiaj voĉo kaj esprimoj estas riĉaj kaj diversformaj, kaj kapablas esprimi la emocio-ŝanĝojn de la dramo ĝis la plej delikata nuanco.

Ŝi uzas la Honan-an popularan parolon, evitante lokajn esprimojn ne konatajn de homoj el aliaj lokoj. Tiel, la Honan-operoj de ŝi prezentataj povas ĝui vastan popularecon. Dum la kontribuaj prezentadoj en diversaj lokoj la Honan-opero multe plaĉis al la amasoj kie ŝia dramo-trupo vizitis.

Trad. Censinio

Kurantaj Aferoj

Ĉio Farita en Ĉinio

Dank' al la sukcesa produkto de X-radiaj valvoj por uzo en medicina laboro kaj industrio tutaj kompletoj da X-radiaj ekipaĵoj nun povas esti fabrikitaj en Ĉinio. La prepara laboro de eksperimentado kaj esplorado estas kondukita en la X-radia laboratorio de la antaŭa Fako de Fiziko de Cinghua-Universitato, direktita de Profesoro Ju Ĵui-huang. X-radiaj valvoj nun estas produktataj en konsiderinde granda skalo kaj je kosto de nur dekonono de tiu de la importitaj valvoj.

* * *

Ĉiuj partoj de radi-ricevilo nun povas esti faritaj en Ĉinio. Tutaj kompletoj da valvoj por radi-ricevilaj, inkluzive de miksilaj, R. F. ampleksigiloj, duoblaj de-tektaĵaj amplifikatoroj, potenco-amplifikatoroj kaj rekti-filoj, jam sukcese fabrikiĝis en la Nankina Fabriko de Elektraĵaj Instalajoj.

La Printempa Festo

Dum du mil jaroj, kiam la nova printempo alvenas, la ĉinoj multe sin okupas pri la bonvenigo de grandioza festo. En foiroj kaj bazaroj elmontriĝas vico post vico da multkoloraj bildoj, aro post aro da fajrokrakaj kaj diversaj specoj de bele faritaj ludiloj, allogante amasojn da klientoj. La viroj klopodas aĉeti viandojn kaj fiŝojn, la virinoj klopodas fari novajn vestojn por la infanoj, la junaj fraŭlinoj tondas belajn fenestro-ornamatojn el bril-kolora papero per siaj lertaj manoj....

He, la Printempa Festo venas!

La Printempa Festo estas la Novjaro, laŭ la antikva ĉina luna kalendaro. Tiu festo komenciĝis dum la regado de Imperiestro U de Han-dinastio (140 jaroj a.K.). Post la malnova demokratia revolucio en 1911, kiam Ĉinio oficiale alprenis la sunan kalendaron, ĝi prenis la nunan nomon. Ĝi estas ĉina popola festo kiu havas la plej longan historion — historion de pli ol du mil jaroj. La festo komenciĝas je la 23a tago de la 12a monato kaj finiĝas je la 19a tago de la 1-a monato laŭ la luna kalendaro, tiel ĝi estas festo tre pompa kaj plej longdaŭra. Ĝenerale, la Printempa Festo okazas ĉirkaŭ la fino de januaro aŭ la komenco de februaro. Sed ĉar la lasta lunkalendaro jaro havis 13 monatojn, la Printempa Festo ĉifoje alvenas malfrue ĝis la 14a de februaro.

La 23a tago de la 12a monato lunkalendaro estas la protazo de la Printempa Festo. En tiu tago la ĉinoj festas la tiel nomatan "Malgrandan Novjaron." En la pasinteco ĉiuj familioj "adiaŭis Dion de Kuirejo" en tiu tago. Laŭ antikva ĉina mito, Juhuang (ĉefo de ĉiuj dioj) asignis Dion de Kuirejo al ĉiuj hejmoj por kontroli la virtojn de iliaj anoj. En la 23a tago de la 12a monato ĉiujare li finplenumas sian tutjaran taskon kaj reiras al la ĉielo por fari raporton. Tiutage ĉiuj familioj bruligis incenson kaj papermonon kiel adiaŭan donacon. Malkleraj homoj eĉ metis antaŭ lia bildo maltosukeraĵon por "kunglui liajn lipojn" tiel ke li nenion povos paroli kontraŭ ili post kiam li iris al la ĉielo.

Post la "adiaŭo al Dio de Kuirejo", ĉiuj hejmoj fariĝis eĉ pli aferoplenaj. Jen oni purigis la ĉambrojn, jen oni preparis "novjarajn" manĝaĵojn, jen oni aĉetis diversajn provizojn. Laŭkutime oni nek aĉetis nek vendis de la unua tago ĝis la kvina tago de la unua monato, do oni devis pretigi sufiĉe da ĉiutagaj necesajoj antaŭ la antaŭvespero de la "Novjaro." Oni ankaŭ ne uzis tranĉilojn nek tondilojn de la unua ĝis

la kvina tago, tial oni devis fintranĉi ĉiujn kurotajn legomojn kaj viandojn antaŭ la antaŭvespero. Laŭ onidiro, la uzado de tranĉiloj aŭ tondiloj ĉe la "Novjaro" alportas malfeliĉon. Kompreneble tio estas nur superstiĉo, sed tio ja klarigas la fakton ke la ĉina popolo vere amas pacon kaj eĉ ne volas uzi tiajn akrajn ilojn en la komenco de la jaro.

La Antaŭvespero de "Novjaro" ja estas amuza. Ruĝaj paralelaj paper-slipoj kun vers-paroj estas algluitaj sur la pordojn de ĉiuj domoj. Sur la muroj dense pendas belaj "novjaraj" bildoj. Paper-ornamatoj lerte tonditaj de junulinoj troviĝas sur la fenestroj. En ĉiuj domoj la lampoj kaj lanternoj restas brilantaj tra la tuta nokto dum fajrokrakaj bruas kaj brudas ĝis tagiĝo. Ĉiuj homoj surmetas siajn novajn vestojn.

En la urboj kaj vilaĝoj ĉiuj sidas ĉirkaŭ lampoj aŭ ruĝaj kandeloj kaj aŭskultas maljunulojn fari mitajn rakontojn. Tiuj kiuj forestas escepte de absoluta neceso, ĝenerale rapidas hejmen por festi la "Novjaron" kune kun siaj familioj. En la pasinteco je la tagiĝo de la "Novjaro" ĉiuj anoj en la familioj oferis, estrite de la familiestro, al siaj praavoj. La infanoj koŝtoŭis* antaŭ la plenaĝuloj prezentante "novjaran" saluton kaj la plenaĝuloj donis al ili monon kiel "novjaran" donacon. Kiam la suno aperis en la oriento, intimaj parencoj kaj amikoj iras unu al la alia por fari "novjarajn" salutojn. La virinoj ege okupiĝis por bonvenigi kaj adiaŭi la "novjarajn" vizitantojn. En Junnan-provinco kaj la najbaraj regionoj estas la kutimo ludi balancilojn en "Novjara Tago." Ĉie la homoj dronis en grandaj plezuroj kaj amuzoj.

De la 2a ĝis la 13a tago de la unua monato, malproksimaj parencoj kaj amikoj iris salutate unu la alian. En la urboj ĉiuj vendejoj malfermiĝis en la sesa tago sed la teatroj, kinejoj kaj aliaj publikaj amuzejoj estis jam plenigataj de gajaj homoj komence de la "Novjara Tago." Printempa Festo en la vilaĝoj estas la tempo kiam la kamparanoj jam finis sian laboron kaj estas tute liberaj kaj ili sin amuzas laŭ sia deziro. En pli grandaj vilaĝoj laŭvice okazas novjaraj kunvenoj kie la lokaj teatraĵoj prezentigas dum la gejunuloj ĝoje dancas jangon aŭ prezentas dramojn sur la stratoj, ludante diversajn rolojn kaj akompanate de la taktoj de tamtamoj kaj tamburoj.

Sed la plej alta tajdo de la Printempa Festo okazas en la Lanterna Festo. De la 13a ĝis la 19a tago diverslokaj popolanoj gaje celebras tiun feston. Estas vere ke la "novjara" antaŭvespero estas amuza, sed tiu-



Ankaŭ la tri-persona "leonejo" estas tre populara dum la festo.

nokte ne aperas la plena luno kaj homoj plejparte sin amuzas en sia hejmo. Kiam venas la Lanterna Festo, la brila luno pendas alte en la ĉielo. Ĉiuj eliras el siaj domoj, promenas en la lunlumo kaj rigardas fajraĵojn kaj kolorajn lanternojn. En la urboj la vendejoj pendigas antaŭ siaj pordoj lanternojn kaj diverskolorajn ornamaĵojn kaj la stratoj aspektas tre pompaj kaj belaj. En la vilaĝoj ankaŭ la lanternoj lumigas. Ĉie la homoj ekscitite bruligas fajraĵojn kaj ludas floranternojn aŭ fajro-drakojn. La fajraĵoj estas flavaj, blankaj aŭ ruĝaj en koloro. Iuj el ili sin ĵetas alten kaj eksplodas en la aero, iuj eligas sinsekvon da krakbruoj kaj aliaj elsendas fajrerojn pli ol dek futojn alten. La lanternoj estas diversformaj kaj diverskoloraj kaj prezentas varian belecon. Sin trovas lotuso-lanternoj, papilio-lanternoj, orfiŝo-lanternoj kaj tiel plu. La fajrodrakoj estas kunplektitaj el bambustangoj kaj ĉirkaŭvolvitaj per ruĝa ŝtofo. Interne de ili estas fiksitaj brulantaj ruĝaj kandeloj kaj kelkaj homoj ilin tenas alte kaj svingas dancante. Ĉie flagras belaj brilaj kaj ĉie ondas ĝojo kaj ridetoj. En la 19a tago la Printempa Festo adiaŭas la homojn kun siaj plezuroj kaj amuzoj.

* * *

Tamen la korupta malnova socio ŝprucigis malbelan polvon sur tiun ĉi historian feston de la ĉina popolo. La Printempa Festo estis tago kiam la bienuloj kaj pruntedonintoj perforte devigis la kamparanojn pagi rentojn kaj ŝuldojn. Pretekstante ke ili likvidis kontojn en la jar-fino, ili kruele detruis milojn kaj milojn da familioj. Kiom da farmuloj, same kiel Jang Pajlaŭ en la opero "Blankhara Knabino", estis devigitaj forvendi siajn proprajn filinojn kaj iri sur la vojon de sinmortigo; kiom da ŝuldantoj estis devigitaj suferi malsaton en terura malvarma vento sin kaŝante for de la lakeoj de la bienuloj aŭ pruntedonintoj en la antaŭvespero de la "Novjaro"; kiom da laboristoj kaj komizoj perdis siajn laborojn pro la frivola maldungo fare de la dungintoj kaj enviciĝis en la armeon de senlaboruloj! Dum la Kuomintanga regado la ĉiam saltantaj var-prezoj, okaze de la Printempa Festo, similis al flugdrako kun rompita fadeno kaj plialtiĝis kelkoble kaj eĉ kelkdekoble. La laborantaj popolanoj kiuj ricevis nur malaltajn salajrojn ĉiam sentis ĉagrenon antaŭ la Printempa Festo. Pri tiu malfeliĉa tempo ili rakontis kun dolora memoro: "Por ni tio ne estis "Novjaro" sed nur nefacile trapuŝebla bariero!"

La reakcia reganta klaso eĉ senhonte trompis la malriĉajn popolanojn dirante: "Vi fariĝas malriĉa pro via malbona sorto, ke diabloj de malriĉo venis al via domo." Multaj laborantaj popolanoj kiuj ne posedis sciencan scion estis influitaj de tiu ĉi reakcia filozofio. En kelkaj sudaj provincoj la malriĉaj kamparanoj kunportis dum "Novjaro" lanternojn kaj bastonojn, marŝis tra la stratoj, kriante, por forpeli diablojn de malriĉo. En ĉiuj lokoj tra la tuta lando ankaŭ disvastiĝis la "novjara" kutimo bonvenigi Dion de Riĉo aŭ Mon-drakon.

Finfine, kun bruego kiel fulmotondro la ĉina popolo forpelis la diablojn de malriĉo—en 1949 la ĉina popolo akiris liberon. Ili trovis kie la realaj diabloj de malriĉo kuŝis kaj kiuj ili estis. Tiuj diabloj estis ĝuste imperialismo, feŭdalismo kaj burokrata kapitalismo. La popolo ekleviĝis kaj forpelis ilin kaj feliĉo tuj venis al ili kvazaŭ nova printempo.

La salajroj de la laboristoj plialtiĝis. La kamparanoj akiris sian teron. La var-prezoj stabiligis. La Centra Popola Registaro difinis la Printempan Feston la plej longdaŭra libertempo el ĉiuj landskalaj ferioj (3 tagoj por la Printempa Festo, sed por la Novjaro nur 1 tago, por la Nacia Tago nur 2 tagoj, t.e. 1-2 okt.). Pro tio la Printempa Festo fariĝas eĉ pli ĝojiga kaj aferoplena. La homoj forŝiris la bildon de Dio de Kuirejo, forbruligis Dion de Riĉo kaj la kamparanoj surgluis la novajn paralelajn paperslipojn:

Ekfloras jen la arb' de fero**

Revenas nun al ni la tero.

En Lajjang de Ŝantung-provinco maljunulino deprenis sian truoplenan veston dekokjaran kaj surmetis alian tute novan en la Printempa Festo de 1951. "Jen estas la komenco. Mi fariĝos ankoraŭ pli riĉa en la venonta Printempa Festo," ŝi diris.

Jes, tio estas nur la komenco. Kiam la Printempa Festo de 1953 alvenas, estas ĝuste la tempo kiam la popolo komencas konstrui grandskale sian patrion kaj feliĉan vivon. Ĉu estas troveblaj iuj vortoj plej taŭgaj por esprimi la eksciton de la ĉina popolo por tiu ĉi Printempa Festo?

Trad. I. K.

* *surgenue riverenci.*

** *arbo de fero (cycas revoluta) tre malofte floras en mezvarma Ĉinio. Per tio la kamparanoj volas aludi sian nunan feliĉon malfacile akiritan.*

Kurantaj Aferoj

Pli da Loĝejoj kaj Lernejoj en Pekino

Multaj laboristoj en ŝtataj fabrikoj en Pekino kaj ministoj laborantaj proksime de la ĉefurbo jam transloĝiĝis en novajn hejmojn je la antaŭvespero de la Novjaro. Pli ol 450,000 kvadrataj metroj da plankspaco finkonstruiĝis en la pasinta jaro.

Kun la aldoniĝo de pli ol 40,000 novaj lernantoj de elementaj kaj mezgradaj lernejoj en tiu ĉi semestro, ĉirkaŭ 80,000 kvadrataj metroj da novaj lernejoj konstruaĵoj estas kompletigitaj krom pligrandigoj kaj riparoj. Ili inkluzivas lernoĉambrojn, oficejojn, bibliotekojn, manĝoĉambrojn, kuracejojn kaj dormoĉambrojn por instruistoj kaj lernantoj.

Konstruado Komenciĝos ĉe 170 Lokoj en Nordokcidenta Ĉinio

Domkonstruado en Nordokcidenta Ĉinio ĉijare estos sesoble de tiu de la pasinta jaro. Estas jam aranĝite ke laboro komenciĝu samtempe ĉe 170 lokoj tuj kiam komenciĝos la printempa degelo.

Arganoj, alispecaj levmaŝinoj, terskrapilegoj, elektraj motoroj kaj pumpiloj kaj aliaj maŝinoj aplikiĝos en skalo neniam konita en tiu ĉi regiono.

Norda Ĉinio Kreis Grandan Riĉaĵon

Ŝtataj industriaj kaj minaj entreprenoj en Norda Ĉinio superplenumis je 24.9 procentoj siajn planojn de 1952, kreante ekstran riĉaĵon de ses mil miliardoj da juanoj per pliprodukto kaj ŝparo. Tio ĉi puŝis la tutan valoron de la industria produkto de Norda Ĉinio en 1952 ĝis 61 procentoj super tiu de 1951.

Kurantaj Aferoj

Ĉe la Pramotransirejo

Liu Ŝaŭ-tang

I

La hejmo de Ju Cing-lin situis ĉe la kurbiĝo de la rivera digo. Heĝo plektita el gaŭliang-trunketoj ĉirkaŭbaris triĉambran terdomon; en la korto kreskis jujubarbo kun tordita supro, peze ŝarĝita de siaj verdaj fruktoj. Dumnokta pluvego ĵus ĉesis ĉe la mate-niĝo kaj la malseka heĝo estis vualita de vaporiganta humido. Pli ol dek blankaj anasoj kriadis ŝanceliĝante en la korto.

Kun nudaj brakoj kaj piedoj kaj verda gaŭliang-trunketo en mano, Cing-lin pelis la anasojn al la rivero. La suno montris sian verdon de post la orienta monto kaj faris la riveran supraĵon ore brilanta. La rivera akvo senĉese kreskis kaj kuris en la ĉebordajn fosaĵojn. Ligita al fosto ĉe la transirejo granda pramo kuŝis dance balance sur la akvo.

Peze ŝarĝita aŭtomobilego alkuris laŭ la ŝoseo. Kiam ĝi alvenis al la bordo, la juna konduktoro sur la aŭto kriis al Cing-lin:

“Bonvolu venigi la pramiston ke li transportu nin.”

“Tio estas nenecesa, mi vin transportos,” diris Cing-lin.

La konduktoro malestimis lin kaj ŝajnigante ne bone aŭdi, kriis obstine: “Hej, bonvolu serĉi por ni la pramiston!”

Cing-lin respondis ridetante: “Ne taksu min tiel malalte! Ni knaboj kreskantaj apud la rivero manipulas la boaton kvazaŭ ni ludus per lanterno.” Li kuris al la pramo, ĝin malligis kaj lerte tuŝetis la bordon per bambustango kaj la pramo jam debordiĝis.

Kiam la aŭto surpramiĝis, la konduktoro mezuris Cing-lin'n per rigardo: li estis maldika sed altkreska, tute infaneca kaj havis maksimume ĉirkaŭ dek ok jarojn. Tiam li admonis: “Juna frato, estu singarda! En la aŭto estas terkulturaj instrumentoj por la kooperativo.” Tion aŭdinte, Cing-lin levis la bambustangon el la akvo, ŝovis sian kapon en la aŭtomobilon kaj rigardis. Jen novtipaj plugiloj, fojnotranĉiloj, falĉiloj kaj junkaj korboj por rikolto. Cing-lin eligis sian langon avide kaj sensate rigardis.

La pramo naĝis malsupren laŭflue kaj la konduktoro kriis maltrankvile: “La pramo renversiĝos, bona frato!”

“Kiel malkuraĝa vi estas!” Parolante, Cing-lin ekpuŝis la bambustangon forte per siaj brunaj brakoj kaj la pramo tuj turnis sin al la bordo. Tiel li ripetis kelkajn fojojn. Baldaŭ li jam ĵetis la ankron kaj albordegis la pramon.

La konduktoro frapetis lian ŝultron: “Juna frato, vi estas bravulo, mi vin serĉos por la transiro ĉe la returno.”

“Vi devas reveni rapide. Vespere la torento impetos kaj pramo tre facile renversiĝos. Tiam transiri estos malpermesite.”

La konduktoro informiĝis pri lia nomo kaj donis al li la trairpagon, kiun Cing-lin portis al la dometo de Laŭ Ĉang, la pramisto, kiu dormis profunde ĝis nun.

Kuan Ŝan, la partiĉela sekretario ellitiĝis matene por kolekti fekaĵon. Kiam li vidis ke Cing-lin mani-

pulas la pramon, li diris al lia patrino, kiu estis pre-ninta fajrlignon por kuiri:

“Rigardu, bofratino, kia bravulo Cing-lin estas!”

La patrino de Cing-lin ĵetis rigardon al sia filo, palpebrumante siajn ruĝajn palpebrojn: “Dekokjara knabego ankoraŭ restas tiel infaneca. Li ne trovos edzinon, eĉ kiam la blanka barbo volvus lin trifoje!”

Kuan Ŝan formetis sian fakaĵokorbon: “En la kampo Cing-lin valoras tiom kiom forta viro, cetere li ricevis ruĝan flagon pro la fervora lernado. Ĉu tia multpromesa junulo restos fraŭlo?”

La patrino de Cing-lin ĝoje ridis kaj kriis al la nudbrusta junulo:

“Venu por vin lavi, estas tempo por matenmanĝo!”

En la vilaĝo el la kamentuboj de ĉiuj domoj leviĝis fumgarbo kaj pendis en la aero kvazaŭ nebulo. Freŝa vento blovis. La nebulo disiĝis iom post iom kaj fine montris sin la blue blua ĉielo.

II

Post siesto, la akvo ŝvelis plue. La sovaĝa kanaboj sur la tuta bordo aluvia altaj kiel domtegamentoj droniĝis iom post iom kaj ondoj dancis transkapiĝante super la kanaboj.

Du-tri arĝente blankaj sovaĝaj anasoj falis el la aero kaj forflugis fulmorapide tuŝante la akvosupraĵon per siaj ventroj.

Cing-lin staris sur la digo kaj rigardis al la malproksimo sed eĉ signon de aŭtomobilon li ne vidis. Laŭ Ĉang, la pramisto, tiris la pramon al la digo kaj ligis ĝin sur saliko per fera ĉeno.

“Laŭ Ĉang, ankoraŭ restas aŭtomobilo kiu ne transiris. Alligu la pramon post la transportado!”

Laŭ Ĉang respondis malkontente: “‘Por kuŝante parolanta sinjoro, en talio ne sentiĝas doloro’; vi ne zorgas ĉu la pramo renversiĝos. Oni atendu kelkajn tagojn ĝis la akvo defluos.”

Cing-lin rigardis daŭre kun streĉita kolo. Iu frapetis sur lia ŝultro. Li turnis sin. Tiu estas Kuan Ŝan, la partiĉela sekretario kaj la ĉefo de lia interhelpa grupo.

“Rapidu al la kampo, oni atendas vin por legi al ili la ĵurnalon!” diris Kuan Ŝan. Nenion dirinte, Cing-lin tuj iris hejmen por preni la fosilon kaj rapidis al la kampo.

Sur la kampo Cing-lin ekaŭdis rulbruon de aŭtomobilo trans la ‘verdgaza kurteno’.¹ Li leviĝis kaj staris sur piedpintoj sur altaĵo por esplori. Kuan Ŝan ŝercis ridete: “La Bovpaŝtisto ne vidis sian Teksistinon antaŭ noktomezo, Cing-linĉjo!”² Cing-lin ruĝiĝis kaj rapideme klarigis: “Ĉu vi ne vidis matene ke mi transirigis aŭtomobilon? Ĝi estos egale plene ŝarĝita ĉe la returno. Nun la pramo estas alligita kaj la ondaro tiel furiozas. Mi ja tre maltrankviliĝas pri ĝi!”

La ceteraj grupanoj diris: “Eble Laŭ Ĉang, la pramisto ankoraŭ ne hejmeniris. Estas preferinde havi tason da trinkaĵo el jujubfolioj kaj iom ripozi!”

La aŭto estis plene ŝarĝita de sakoj da sojfabo, sur kiuj sidis knabino havanta ĉirkaŭ dek ses jarojn, kun unu mano alkroĉiganta al la sakŝnuro kaj tenanta mal-

fermitan sunombreton en la alia. Ŝia korpo balanciĝis tien reen laŭ la skuado de la aŭto. La du olebrilaj harplektaĵoj dancis ankaŭ pro la skuo.

Vidante, ke la pramo estas alĉenita, la kondukto iris al la dometo por serĉi la pramiston, sed la domo estis vakanta kaj eĉ la litmato estas forportita. Li maltrankviliĝis kun senkonsileco, kaj rigardante al la kvaron-kilometron larĝa rivero kun grandaj ondoj kiel timigitaj bovoj li ŝvitgutis sur la frunto.

Ne malproksime de la transirejo, du viroj ĝuis malvarmeton sub arbo. Unu estis Vang Fu-liang, kromnomita 'Blinde-palpanto en Maro', kiu iris al la riverbordo por siesto kaj tro longe dorminte ne plu intencis reiri al la kampo; la alia—Li Joŭ-fu, estis tipa unuopemulo en la vilaĝo kaj kromnomita 'Riĉmaniulo'; li estis rigardanta la akvon kuntirinte la brovojn.

Vang Fu-liang montris la aŭtomobilon al Li Joŭ-fu kaj proponis: "Rigardu, la kondukto turnis sin pro malkvieto, ni elpremu ion el li, kiel vi opinias?"

Li Joŭ-fu skuis la kapon neante: "Mi ne kuraĝas. En tia akva vastaĵo, ĉu tiaj mallertuloj kiaj ni povas transirigi grandan ŝarĝaŭton? Se okazus akcidento, la respondeco estus pezega."

Vang Fu-liang nazgrimacante respondis: "Ne gravas. Ni nur restu en aplombo kaj pilotu laŭ la fluo, nenia akcidento okazos." Li Joŭ-fu ŝanceliĝis kaj diris nur: "Tridek mil juanoj³ ne valoras tiom da maltrankvilo dum la transportado. Cetere, kiam Laŭ Ĉang scios, li faros al ni bonan lavon."

Sed Vang Fu-liang diris mokante: "Vera stultulo vi estas. Ĉu oni ne pagos malavare en tia kriza momento?"

"Bone, lin venigu," diris Li Joŭ-fu.

"Ne hastu, lasu lin veni mem," respondis Vang Fu-liang. "Ĉu ne? Jen li venas."

"Hej! Bonvolu serĉi por ni la pramiston!" La kondukto, vidante ilin, kvazaŭ soifanto trinkanta freŝan akvon, alproksimiĝis kaj salutis.

Li Joŭ-fu, nun kun neniom da dormemo, stariĝis kaj diris mansvingante:

"La pramisto forestas. Li hejmeniris."

"Do bonvolu serĉi por ni Ju Cing-lin'n."

Aŭdinte ke la kondukto speciale nomis Ju Cing-lin'n, Li Joŭ-fu iom stultiĝis, tiam Vang Fu-liang alpaŝis rapide kaj diris: "Kiu povas scii kien li iris! Vidante ke vi estas tiel maltrankvila kvazaŭ pikita de skorpio, ni vin transportu."

"Sur la aŭto estas manĝoprovizaĵo apartenanta al la ŝtato, ne estas ŝercaĵo."

Vang Fu-liang fanfarone frapis sian bruston kaj diris: "Ha! Por ni ĉeriveraj loĝantoj—viroj aŭ infanoj—ŝipdirektado eestas ĉiutagaĵo!"

Rememorante la parolon de Ju Cing-lin en la mateno, la kondukto tuj konsentis: "Do nin transportu!"

"Estu komprenite antaŭe ke vi devas pagi malavare. La transiro kovras pli ol kvaron-kilometron. Laciga tasko ĝi estas."

"Bone, bone!" la kondukto konsentis senhezite, "sesdek mil."

Ŝajnigante sin kompetentulo Vang Fu-liang ordonis laŭtvoĉe: "Pretigu la tabulon! Surpramiĝu la aŭto! Vi manipulu la direktilon, Joŭ-fu!"

La koro de Li Joŭ-fu tamburis pro timemo kaj li enboatiĝis tremante.

Jen rano kvakis kelkfoje kaj saltis en la riveron, sed tuj poste elmergis sian kapon kaj rigardis tiujn du ulojn per rondigataj okuloj.

III

Liberigite de la ferĉeno, la pramo, kvazaŭ senbridigita ĉevalo, forgalopis laŭ la torento; sinĉasantaj ondaroj ĵetiĝis kontraŭ la postaĵo de la pramo kaj disŝprucigis sennombrajn akverojn.

Li Joŭ-fu gvidis per la direktilo, ĝin turnante jen dekstren jen maldekstren sed la pramo ne iris obeeme. Vang Fu-liang provis la profundecon de la akvo per la bambustango sed ĝi ne povis atingi la fundon. Li ekstremis kvazaŭ pro frosto. Vidante, ke la kondukto stultiĝas pro maltrankvilo, li kalkulis en si: "Tre verŝajne okazos akcidento! Prefere forkuru!" Profitante la senatenton de la aliaj, bum! li jam malaperis en la riveron kaj la bambustango fornaĝis post li.

Ankaŭ Li Joŭ-fu intencis salti en la riveron, sed la kondukto staris post lia dorso kaj fiksis sian rigardon sur li. Dume la ŝoforo kaj la knabino ankaŭ gardstaris ĉe liaj flankoj. Kvazaŭ oleo bolus en lia koro. "Oni ne ĉasakis vulpon, sed havigis al si malbonan odoron..." Li mordis sian lipon kaj la vizaĝo tute paliĝis. Grandaj ŝvitgutoj eliĝis sur la frunto. Li ekfermis siajn okulojn kaj ĵetis sin en la akvon. La knabino volis lin reteni per kapto sed lia vesto ŝiriĝis. Li liberigis sin de ĝi kaj malaperis en la profundon.

La knabino ankaŭ falis en la riveron malgraŭ si. La kondukto freneziĝis pro malespero. Tamen la knabino baraktis kaj elmergis sin alkroĉiĝante al la ŝiprando per ambaŭ manoj. La kondukto etendis siajn manojn por ŝin eltiri el la akvo. Ŝi paliĝis kaj ŝia brusto leviĝis kaj malleviĝis pro spiregado.

La ŝoforo, pala en la vizaĝo, diris: "Ne timu, mi pilotos la pramon!"

La pramo turniĝadis sur la akvo kvazaŭ folieto.

Tiutempe la knabino vidis ke homoj troviĝas en la kampoj ĉe la rivera bordo, tiam ŝi kriis plengorĝe:

"Helpon! En la aŭto estas manĝoprovizaĵo de la ŝtato!"

Apenaŭ formortis la voĉo de ŝia parolo, jen alkuris junulo kiel fluganta sago kaj post li sekvis viroj kaj virinoj.

Kuan Ŝan, la partiĉela sekretario, diris: "'Tro multe da kokinoj ne elmetos ovon', mi enakviĝu kun Cing-linĉjo." Parolante li saltis en la riveron kaj ondo lin subakvigis.

La kondukto vidis Cing-lin'n kaj kriis pro ĝojo:

"Ne lasu la du kanajlojn forkuri, frateto!"

Cing-lin turnis sin kaj vidis, ke Vang Fu-liang kaj Li Joŭ-fu spiregas ĉe la digo. Cing-lin rondigis siajn nigrajn okulojn kaj direktis sin al ili naĝante. La du kanajloj rapidis grimpi sur la digon pro timo. Sed Cing-lin kaptis ilin je unu piedo per unu mano kaj tiris ilin al la profundo. Tiuj du vekriis: "Panjo, panjo!"

Kuan Ŝan alkriis: "Lasu ilin, Cing-linĉjo, kaj tuj venu por puŝi la pramon!"

"Mi reguligos kun vi la kontojn poste!" diris Cing-lin minace, forlasis la kaptiton kaj naĝis al la pramo.

Kuan Ŝan manipulis la direktilon kaj Cing-lin puŝis je la malantaŭo kaj la pramo baldaŭ albordiĝis.

La kondukto brakumis Cing-lin'n: "Bona frato! Nur dank' al vi kaj tiu oĉjo la proprajo de la ŝtato ne suferis domaĝon!" La ŝoforo elpoŝigis cent mil juanojn

kaj diris: "Vi estas tre lacaj. Prenu tion kiel trinkomon kaj vin iom refreŝigu!" Kuan Ŝan kaptis lian manon kaj ŝovis ĝin en lian poŝon dirante: "Defendi la ŝtatan proprajn estas ĉies devo, kamarado, ĉu decas preni rekompencan pro tio?" La ŝoforo tre kortuŝiĝis kaj liaj lipoj tremetis pro ekscito. Li ne povis eligi eĉ unu vorton.

Ili reciproke manpremis forte.

La suno jam subiris kaj estigis vesperruĝon, kiu kovris ilin ĉiujn kvazaŭ ruĝa mantelo.

IV

La knabino kaŝis sin en la kanabkampo, demetis sian superveston por eltordi la akvon. La rondaj kanabfolioj interpretis densdense kaj kaŝis ŝin en la centro.

La aŭtomobilo vomis fumon kaj eligis zumbruon. La konduktoro kriis: "Survenu, fraŭlino." Ŝi vestis sin rapide kaj venis el la kanabaro. Sed ŝi kuntiris la brovojn rigardante al la ĉielo kaj murmuris: "Estus tro malfrue alveni al Pekino. Mi timas ke mi ne trovos lin."

"Kian urĝan aferon vi havas en Pekino" demandis Cing-lin.

"Mia frato estas resendita de korea fronto por ripozo. Mi iras viziti lin. En fremda urbo, mi timas, ke mi ne povos trovi lin baldaŭ. Cetere la vestaĵoj estas malsekaj..." La knabino maltrankviliĝis.

Vidante, ke akvo ankoraŭ gutas de ŝia pantalonon, Cing-lin diris kolektante la tutan kuraĝon por ke li ne ruĝigu: "Pasigu hodiaŭ la nokton ĉe ni!"

"Dankon por via bonvolo, se tio ne tro ĝenus vin!" La knabino tre ĝojis.

Tiun vesperon Cing-lin sidis sur la digo por gardstari. La knabino jam demetis siajn malsekajn vestaĵojn kaj surmetis la novajn superveston kaj pantalonon el blua katuno de la patrino de Cing-lin. Ŝi prenis sid-maton kun si kaj iris al la digo. Blovis la rivera vento kaj pufigis ŝiajn tro grandajn vestojn. Ŝi sentis fluon de malvarmo kuranta tra la korpo kaj tuj sidiĝis. Cing-lin ridetis al ŝi.

La blanketa Lakta Vojo kuŝis kviete sur la blua firmamento, ĉe ties du bordoj sennombraj steloj saltetis.

"Via nomo estas Ju Cing-lin, vi havas dek ok jarojn kaj estas ano de la Junula Ligo, ĉu ne?" demandis la knabino.

"Jes," respondis Ju Cing-lin. "Sed kiel vi scias?"

"Mi ĵus demandis onjon."

"Kaj vi?"

La knabino tute ne hontemis kiel junulinoj sub feŭda reĝimo: "Mi nomiĝas Li Ĉun-lan, estas deksep-jara, kaj aliĝis al la Junula Ligo en la tria monato ĉijare. Mi loĝas en la vilaĝo Orienta Ulmaro."

"Kiom da familianoj en via hejmo? Ĉu vi jam partoprenis la interhelpan grupon?" Cing-lin plue demandis kun kuraĝo.

"Mi vivas kune kun miaj gepatroj kaj bofratino. Ni estas membroj de la agrikultura produkta kooperativo," Ĉun-lan palpebrumis. Ĉu ŝi ankoraŭ ne ekzistas en via vilaĝo? Tio venos iom post iom."

Cing-lin ne cedis al la kritikisto: "Ni atendu ĝis post la rikolto! Nia grupo nepre fariĝos produkta kooperativo. Tiam ĉio maturiĝos kaj pretiĝos por la afero."

Silento.

Subite brue kriis la vilaĝaj infanoj: "Iru sub la viton por aŭskulti ilian ploradon!"

"Kion tio signifas?" demandis Ĉun-lan.

"Hodiaŭ estas la sepa de la sepa monato. Ĉu ne tuj okazos la rendevuo de la Paŝtisto kaj la Teksistino ĉe la 'Ĉiela Rivero'?"² Cing-lin respondis.

Ĉun-lan ridetis, ruĝigante.

La sekvantan matenon, post kiam Ĉun-lan matenmanĝis, Cing-lin akompanis ŝin al la aŭtobuso. La stacio estis plena de homoj. Ĉun-lan diris al Cing-lin: "Nun hejmeniru!" Cing-lin aspektis malĝoje kaj staris senmove sur la vojo. Ĉun-lan diris ruĝigante: "Vi kaj onjo estas tre afablaj. Mi revizitos vin post la rikolto kaj pasigos ĉe vi iom da tempo."

Kun rideto ĉe la buŝangulo Cing-lin hejmeniris bonhumore.

La klara akvo de la rivero brue fluis al la sudo. La pramo ĉe la transirejo transportis homojn, ĉevalojn kaj veturilojn. Kaj la pramisto kriis laŭtvoĉe: "Haj-jo!..."

Sur la fruktodona tero ŝvebis naztikla freŝa odoro kaj aŭdiĝis sonoraj vilaĝanaj kantoj.

Tradukis S. J.

1) Verdgaza kurteno: la plenkreskanta kaŭliangaro.

2) Bovpaŝtisto kaj Teksistino estas du stelaroj kiuj situacias unu kontraŭ la alia kun la Lakta Vojo inter si. Laŭ popola legendo, la Teksistino estas la nepino de la Ĉielo kaj edziniĝis al la Paŝtisto kontraŭ la volo de la Ĉielo. Por ilin puni, la Ĉielo ordonis, ke ili vivu disiĝe ĉe ambaŭ bordoj de la Ĉiela Rivero (la Lakta Vojo), kaj permesis al ili renkontiĝi nur unu fojon ĉiujare je la meznokto de la sepa de la sepa monato laŭ la luna kalendaro.

3) Juan: monunujo en Ĉinio.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 2

E N H A V O

Bildo sur la kovrilo—Vidaĵo de la laborejoj de la Harbina Lin-teksejo. En la malantaŭo staras la ĥemia stacio de la teksejo, kie ĉia ĥemiaĵo estas preparita por eviti probablan eksplodon aŭ venenon al la laboristoj.

Tri Taskoj por 1953

Vonsan—la Heroa Havenurbo

La Harbina Aŭtomata Lin-teksejo

Kadroj por Industriigo

Sanho-kluzo

Lerni kaj Konstrui Samtempe

Armiloj Fariĝas Agrikulturaj Instrumentoj

Patriota Aktorino Ĉang Ĉiang-ju

La Printempa Festo

Ĉe la Pramotransirejo

TUNG-OLEO

Ĉinio—la plej granda produktanto kaj eksportanto de Tung-oleo—sciis kiel kulturi tung-arbojn kaj ekstrakti kaj uzi tung-oleon multe pli frue ol iu ajn alia lando en la mondo. La utileco de tung-arboj estis jam eltrovita dum la Tang-dinastio (618-907 p.K.) sed nur dum la Sung-dinastio (960-1276 p.K.) Ĉinio komencis kulturi grandskale tung-arbojn.

Tung-oleo estis enkondukita en Eŭropon en la 16a jarcento kaj antaŭ tiu tempo eŭropanoj eĉ ne sciis ke ĝi ekzistas. Tung-oleo venis al Usono nur en 1896 kaj estis diverse nomita tung-oleo, kiri-oleo aŭ ĉina nukso oleo. La unuaj tung-arboj kulturitaj en Usono estis plantitaj en Kalifornio en 1905. Tamen, Usona tung-oleo restas pli kosta ol tiuj specoj produktitaj en Ĉinio.

La tung-arboj estas altaj plantaĵoj kies folioj komencas fali en malfrua aŭtuno. Ili similas al *Sterculia platanifolia*, kun larĝaj folioj, kaj la floroj estas blankaj aŭ ruĝetaj. Ili floras ĉirkaŭ la fino de prin-tempo kaj iliaj nuksoj—kiuj similas al juglandoj—maturigas en aŭgusto aŭ septembro. Ĉiu nukso enhavas kelkajn semojn kiuj donas oleon kiam ili estas premataj.

Estas multaj specoj de tung-arboj en Ĉinio sed la du ĉefaj kategorioj estas:

1) *Aleurites fordii*—tiu ĉi speco kreskas rapide, havas rezistpovon kontraŭ malvarma vetero kaj floras kaj produktas nuksojn en malpli ol tri jaroj post kiam ili estas plantitaj. La nukso estas plata ambaŭekstreme, havas glatan surfacon kaj entenas tri ĝis kvin semojn. Plejparto de la tung-arboj plantataj en Ĉinio apartenas al tiu ĉi kategorio.

2) *Aleurites montana*—la nuksoj de tiu ĉi speco de tung-arbo enhavas tri ĝis kvar semojn. La arboj de tiu ĉi kategorio produktas nuksojn por kvindek jaroj. Ili ne povas rezisti kontraŭ malvarma vetero kiel la supre-dirita speco kaj oni ilin kulturas ĉefe en suda Ĉinio. La surfaco de la ŝelo de la nukso estas malebena kaj pro tio ĝi estas ankaŭ nomata "sulka tung." La ole-enhavo de la kerno ne estas tiel riĉa kiel tiu de la unua speco.

Tung-arboj estas kulturataj plejparte en tiuj provincoj kiel Seĉuan, Hunan, Kuangtung kaj Hupej. Troviĝas nombro da tung-arbejoj en Ĉekiang kaj Kuejĉoŭ sed malplimulte en Ŝensi, Anhuej, Kiangsi, Honan kaj Fukien.

La ĉefaj ingrediencoj de tung-oleo estas: oleacido (4.1%), olemargariko (90.7%) kaj saturita grasacido (4.6%).

Tung-oleo estas multe pli utila ol ĉiu alia speco de vegetaĵo-oleo. Ĝi povas esti uzata laŭ pli ol 850 manieroj kaj ĉefe jene:

1) Por fari ordinaran kolorilon, ŝpruc-kolorilon, lakon, aeroplan-kolorilon kaj emajl-kolorilon.

2) Por servi kiel kovraĵo de akvorezista papero, akvorezista koton-ŝtofo, artefarita ledo, pluvmanteloj, ombreloj, kanvasaj tendoj, celofano kaj cemento.

3) Por servi kiel kovraĵo de aeroplanoj, ŝipoj, aŭtomobiloj, lignaĵoj, fiŝ-retoj por protekti ilin kontraŭ malsekeco aŭ rustiĝo.

4) Por fari rapide-sekiĝantan pres- kaj desegn-inkon.

5) Por fari vomigilojn kaj insektomortigilojn.

Ĝi estas ankaŭ uzata por fabriki artefaritan eburon, snitezan kaŭĉukon, rajonajn (artefaritajn silkojn) kaj najlonajn produktaĵojn. Krome, per procedo de distilado oni povas eĉ akiri Dieseloleon kaj gasolenon el tung-oleo.

Koncerne la produktadon de tung-oleo, Ĉinio okupas unuan rangon en la mondo. En 1936, antaŭ la Rezistmilito kontraŭ

Japana Agreso, ĝia produkto atingis 136,800 metro-tunojn konsistigante 99 procentojn de la produkto tutmonda. Dum tiu milito la produkto malpliigis rezulte de la detruado fare de japanaj imperiistoj.

Pro la liberiĝo de Ĉinio, la produkto en 1951 sub la helpo de la Popola Registaro superis la nivelon dum la milita periodo. Laŭ taksado la produkto en 1952 estis eĉ pli alta.

La mondaj merkatoj bezonas 110,000 ĝis 140,000 metro-tunojn da tung-oleo ĉiujare kaj Ĉinio povas plenumi la plej grandan parton de tiu bezono. Tio estas certigita de Lej Jen-min, membro de la ĉina delegacio al la Internacia Ekonomia Konferenco en Moskvo, kiu deklaris en la unua labor-grupa kunveno:

"Rilate al tung-oleo, Ĉinio, kiu estas la unua ĝin produkti, estas la plej granda produktanto kaj eksportanto en la mondo. Laŭ mia opinio, ni kapablas eksporti tung-oleon sufiĉan por plenumi la bezonojn de la landoj reprezentataj en tiu ĉi konferenco."

